


LA CENTRA OFICEJO

de UEA en vortoj



GBEGLO Koffi

Fondaĵo Afriko de UEA

P R E Z E N T E

LA CENTRA OFICEJO DE UEA EN VORTOJ

GBEGLO Koffi

Fondaĵo Afriko de UEA
Lome, aŭgusto 2002

Multobligado: Hans BAKKER en Amsterdam/Nederlando
Kompostado en la Afrika Oficejo (Raoul K. HOUNNAKE)

P R E Z E N T E

La Centra Oficejo de UEA (CO) estas la sidejo de Universala Esperanto-Asocio. La plimulto de la membroj de UEA ne jam vizitis ĝin. Iuj jam tion faris, sed tute ne pasigis tie nokton. Aliaj plurfoje iris tien, sed ne povis eniri ĉiujn ĉambrojn. Eĉ oficisto de la CO povas nun ne diri kiom da ĉambroj estas en la oficejo kaj kiel nomiĝas ili. Ĉu ne estus bone, ke ni havu informetojn pri la sidejo de nia tutmonda asocio? La sekvaj vortoj prezentas la sidejon de UEA laŭ la vidpunkto de la verkinto. La tuta libreto konsistas el artikoloj jam aperintaj en la periodaĵo Ovo togolanda inter 1998 kaj 2002.

La unua ĉapitro tuj montros kiel atingi la CO-n. Tiuj ĉi informoj ĉiujare aperas en la Jarlibro de UEA. Ne ĉiuj havas la Jarlibron. Tial ĉi en tiu ĉi libro aperas tiuj informoj pri kiel atingi la CO-n. La verkinto estas vidata tra la dua ĉapitro. Tuj poste sekvas naŭ ĉapitroj, tra kiuj la leganto vidos kiel la verkinto malkovris la Centran Oficejon de UEA.

Se ni ŝatus memori, ke la libro konsistas el artikoloj aperintaj inter 1998 kaj 2002 ni povus jam scii, ke tiu periodo havas du partojn. La unua estas la deĵorperiodo de la estraro de UEA elektita en Montpeliero en 1998, kaj la dua komenciĝis ĉe la UK en Zagrebo, kiam oficistoj de UEA anoncis siajn demisiojn.

Necesas vidi la vizaĝon de la CO ekde 2002. Tial aperis la dek-unua ĉapitro, kiun kompletigas la dek-dua. Tiu ĉi estas nenio krom la artikolo de la nova Direktoro de UEA, Trevor Steele, kiu eklaboris en januaro 2002.

Bonan promenadon tra la Centra Oficejo en vortoj!

MAPO POR ATINGI
LA CENTRAN OFICEJON
DE UEA

BELGIO

HAGO
AMSTERDAMO

Centra
Stadidomo

Tramo 4

Hofplein

Weena

Coolsingel

Westdraak

Oude Binnenweg

Sandwichsingel

Westersingel

Mauritsweg

Westersingel

West Kruiskade

Wolvenst

Henegouwerlaan

Nieuwe Binnenweg


Mathenesserlaan

CENTRA
OFICEJO

's-Gravendijkwal

Rochuskerkstraat

MAASTUNNEL
(MOZTUNELO)



Informoj pri la Centra Oficejo de UEA (el la Jarlibro 2001)

Centra Oficejo

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Telefono

(010) 436 1044

Telefakso

(010) 436 1751

Telegramoj

ESPERANTO ROTTERDAM

Retpoŝto

<uea@inter.nl>

<uea@co.uea.org>

Vizitantoj

La domo de la CO apartenas al la asocio. Vizitantoj, bonvolu laŭeble anonci sin antaŭe. De la Centra Stacidomo eblas piediri (20 minutojn) aŭ veturi per tramo 4, direkto Schiedam (ŝhidam) aŭ Marconiplein, kaj eliri ĉe la kvina haltejo, 's Gravendijkwal (prononcu Ŝrafndejkval). Vidu la mapon en la kontraŭa paĝo.

MIAJ NASKIĜ- DATOJ/FESTOJ

Mi tute ne plu memoras, kiam mi ekkonscis pri mia aĝo. Tamen mi ĉiam memoras, ke iam mia frato, la unua filo de miaj gepatroj, diris : vi havas 7 jarojn. Ekde tiam mi ĉiujare aldonas unu al la pasintjara cifero por trovi la freŝjaran. Tial nun en 2001 mi scias, ke mi estas en la kvardekkvar-a jaro de mia vivo. Certe evidenta demando povas tuj trudiĝi, ĉu ne ? Ĉu mi ne havas naskiĝ-ateston ? Bone, ni vidu !

La patro de la patro de mia patro nomiĝas Senagbe. La patro de tiu ĉi kaj tiu de alia viro Sokpo estas duonfratoj. Tiel Sokpo estas onklo de mia patro. Li estas do mia avo, ĉar en nia medio frato aŭ fratino de ies patro estas konsiderata kiel ties patro. Simile frato aŭ fratino de ies patrino havas la rangon de ties patrino. La aveco de Sokpo super mi estas tia, ĉar frato (duonfrato, tamen frato) de la patro de mia patro .

Sokpo vivis longe en sia nasikĝ-vilaĝo. Ĉar la vivo tiea fariĝis malfacila, li decidis migri al la ĉefurbo por trovi laboron. Tie lin oni akceptis kiel gardiston en laborejo de advokato. Sokpo tute ne estis malsterila. Li havis edzinojn, sed nur unu naskis tri filojn kaj unu filinon. Tiuj ĉi estas nun patr(in)oj/av(in)oj, kaj Sokpo jam mortis antaŭ pli ol dek jaroj. Liaj gefiloj devis multe labori por vivteni sin.

Multajn ideojn ili havis. Unu el ili decidis havigi al si pasporton. Por tion ĉi havi oni devas unue havi sian ateston pri ŝtataneco. Tion ĉi la filo ne havis. Li iris al la prefektujo de sia regiono por farigi la dokumenton. Oni informis lin, ke li devas alporti naskiĝateston de sia patro. Li do tute certiĝis, ke lia patro havas tion ĉi, ĉar tiu ĉi laboris en la ĉefurbo ĉe advokato. Li tamen forgesis, ke li ne havis sian naskiĝateston, kaj surogaton oni poste faris al li. Li ne kulpu pri tio ĉi, ĉar ankaŭ la patro povus havi tian surogaton. Li antaŭe tute ne informiĝis pri tio, kaj tute ĝoje veturis al Lome por preni la naskiĝ-ateston de la patro.

Kiam li alvenis, la patro sidis trankvile en sia brakseĝo fumante sian pipon kaj manĝante kolaonukson.

La dentojn jam nigrajn pro la fumado la kolaonuksoj ne povis ruĝigi. La malblankeco de la dentoj tute ne ĝenadis lin, ĉar liaj kantemo kaj ŝercemo devigadis lin ĉiam montri ilin al homoj : li estas ridema kaj ridigeme. Ridegante, li demandis la filon :

- Ĉu vi alportas bonan novaĵon el la vilaĝo ?

Ne tuj respondis la filo. Li sidis apud la patro, kaj lin salutis, ricevinte bolon da akvo. Li devis poste klarigi kial li venis al la patro.

- Kiu tion petis de vi ? Ĉu la prefekto ? Li bone konas min. Mi estas certe pli aĝa ol la patro de lia patro. Ĉu li scias ion pri nia historio ? Tuj iru, kaj diru al la prefekto, ke mi estas pli aĝa ol la naskiĝ-atesto. Punktofino.

Estis vera punktofino, ĉar la patro ne havas tian dokumenton.

Hav(ig)o de naskiĝpaperoj estis neebila en Afriko, ĉar ĉiuj estis analfabetoj. La koloniistoj tion alportis, kaj ĝis nun en multaj lokoj la gepatroj ne faras tiajn dokumentojn al siaj ĵusnaskitoj. Kiam tiuj ĉi ekvizitas lernejon, tiam la instruisto petas la dokumenton. Infanoj ne havas, kaj do necesas fari surogaton.

Sur tiuj paperoj oni ne mencias la ĝustan tagon de naskiĝo, ĉar preskaŭ ĉiuj forgesis ĝin. Eĉ se oni memoras, ĉar jam pasis pli ol kvin jaroj post la naskiĝo de la infano, la farantoj de tiuj paperoj ne plu akceptas tion. Surogatado restas ebla. Do sur la papero estas nur la jaro de naskiĝo.

En 1970, ĉe la fino de la lerneja-jaro, mi devus trapasi du ekzamenojn : unu por la finstudo en la elementa lernejo, kaj la duan por daŭrigi la lernadon en duagrada lernejo (antaŭe estis du ekzamenoj, sed nun nur unu).

Por la unua ezkameno tute ne necesis havi naskiĝateston, sed sen tiu ĉi neniuj rajtas trapasi la duan. Mia patro memoris, ke li farigis al mi naskiĝateston, sed ĝin li ne plu retrovis. Ne, tio ne estu stranga. Tiam en la vilaĝoj nur kelkaj estas instruitaj. Kiam tiuj ĉi informiĝas pri naskiĝo de infano, ili tuj vizitas la gepatrojn por farigi naskiĝateston. Kiam tiu ĉi estas farita, la instruisto donas la paperon al la gepatroj. Ĉar tiuj ĉi ne kutimiĝas al paperoj, ili metas ĉien ajn la ateston, kiu tiel estas forgesita. Tiamaniere perdiĝis atestoj de multaj infanoj. Ĉar tiu neglekto fariĝis ĉiutagaĵo, la farigantoj de la atestoj gardas la paperojn kun si, ĝis iam, kiam la gepatroj aŭ la infanoj mem ŝatus uzi ĝin. Risko ne tute mankas ĉe la gardado far la

fariganto ; ili ne estas nemortemaj, naturaj kastofroj povos okazi, ktp. Tiel kvankam tiuj paperoj estas faritaj al infanoj, iuj neniam retrovas sian, kaj nur surogatado helpas. Jen do surogatado akceptis ankaŭ min.

Post longa serĉado de mia naskiĝatesto, kiam mia patro certis, ke li neniam plu retrovos ĝin, li memoris: "Jes, vian naskiĝ-ateston mi vere petis, ke oni ĝin farigis al vi. Mi mem vidis ĝin ĉe la fariginto, sed mi ne tuj volis ĝin preni. Mi nun ne plu memoras kial. Kelkajn tagojn poste okazis brulego en la domo de la fariginto kaj multaj paperoj tiel fariĝis cindroj. Jes, ankaŭ via tiel detruigis.

Kiam mia patro rakontis tion, jam estas malfrue, ke surogatado okazu. Oni devas fari petleteron ; ĝin doni al la juĝisto de la regiono. Oni devos poste viziti la juĝiston, kiu faros multajn demandojn, kaj poste tempego pasos, antaŭ ol la papero estos preta. Tial en junio 1970 mi ne povis trapasi la ekzamenon por daŭrigi la studadon en kolegio. Tamen tiam mi sciis, ke mi estas 13-jara. Kaj en majo tiujara mi baptiĝis.

Dum pli ol unu jaro ni lernis katekismen katolikan. Kiam estis okazonta la baptado, la katekisto petis, ke ĉiu elektu sian nomon. Tiam kiuj havas sian naskiĝ-ateston, tiuj konsultis kalendaron kaj tuj trovis sian bapto-nomon. Aliaj devis elekti la nomon, kiu al ili plaĉas. Preskaŭ ĉiutaga konsultado de la kalendaro dum pli ol tri monatoj necesis, ke mi trovis du nomojn : *Simplice* kaj *Parfait*. Sed tiam mi volis havi nomon, kiun neniu en la vilaĝo antaŭe scias. *Simplice* ne tute nekonata estas, ĉar knabo iam sin nomis tia. Restis do *Parfait*, kaj tial ĝi fariĝis mia baptonomo. Ĝi troviĝas ĉe la 18-a tago de aprilo sur la kalendaroj konsultitaj. Ekde tiam mi diras al ĉiuj, ke mia naskiĝdato estas la 18-a de aprilo. Kvankam mi tiel decidis, tiu dato ne povis aperi sur mia surogato-naskiĝatesto.

En novembro 1970 juĝisto venis al nia vilaĝo por demandi multajn personojn, kiuj petis pri tiu surogatado. Jen finfine la juĝisto trovis, ke mi fakte naskiĝis en 1957. Informante homojn pri mia naskiĝo, mi ĉiam diras : „la 18-a de aprilo 1957“. Mi eĉ iam festis tiun datrevenon.

En 1971, kiam mi estis preparanta mian ekzamenon por daŭrigi mian studadon en kolegio, mi samtempe laboretis por havi monon. Tiam la laboroj farataj de knaboj estis meti kaptilojn al kraboj. Tiujn ĉi ni vendadis por havi monon. Mi povis tiam havigi al mi 30 F CFA (tiam 1FF= 50 FF).

Mi aĉetis enskatoligitan fiŝon oleitan. Nun tiaj kostas ĉirkaŭ 300 F CFA (kaj 1FF = 100 F CFA). Mi ne povas kaŝi, ke tiam 30 F estis grandega sumo. Sola ie, mi prenis mian fiŝon, al kiu mi aldonis tunon da maniokfarunon. Nur laodoro de la fiŝo pruvis, ke ĝi estas miksitakun la faruno. Tiu ĉi estas tiom multa, ke neniu ero de la fiŝo kaj oleo estis videbla.

Haste manĝite, maniokfaruno ŝtopas la gorgon, kaj tiel englutado kaj spirado fariĝas malfacilaj. Tiam nur akvo helpas. Mi trinkis dum mia festo, kaj akvo estis apud mi. Tio estas mia unua kaj lasta festo pri datreveno de mia naskiĝtago. Kvankam en nia lando oni festas nur naskiĝ-datrevenon, mi tute neglektas tion. Mia edzino kaj gefiloj ĉiam postulas siajn kaj finfine mi donas iom da moneroj, kaj la patrino ion organizas por la infanoj. Mi mem ne volas/ŝatas ion tian fari, ĉar tio laŭ mi estas tempoperdo kaj mon-malŝparado por nenio. Ĉu tamen tiu tago, la 18-a de aprilo, estis vendredo?

Mia antaŭnomo estas Koffi. Tiun ĉi oni donas al knaboj de nia regiono, kiuj naskiĝis vendrede. Tiel, la de mi fabrikita naskiĝdato devas kongrui kun mia nomo Koffi. Hazarde, mi konatiĝis kun libro, kiu klarigas, kiel oni povas scii la nomon de ĉiu tago en multaj jaroj. Mi devis kalkuli. La 18-a de aprilo 1957 estis ne vendredo, sed ĵaŭdo. Mi devis do migri al la 19-a de aprilo, je 00h 00mn 00s. Do nun estas tiel.

Sed starigo de statistikoj pri ŝtataj funkciuloj, havigo de pasportoj, ktp. donacis al mi pliajn tagojn.

Plenigante la paperojn por farigi pasporton mi ĉiam menciis kion mi sur mia surogato havas : naskiĝdato : 1957. Kiam la pasporto estis preta, la naskiĝdato sur ĝis menciita estas : 00/00/1957. Tial, kiam mi plenigas paperon, kiun oni poste kontrolos per la pasporto, mi ĉiam menciis tiun ĉi daton. Iam policisto en flughaveno de Parizo tute miris. Mi balbute diris, ke estas vere tiel, ĉar mi naskiĝis ĝuste je noktomezo de la 31-a de decembro al la 1-a januaro je 00h 00m 00s. Li iel okulumis mian tempion, kaj ĵetis la pasporton en mian manon.

Ĉar pasporto eksvalidiĝas, oni regule havas novan. Mia nuna havas la daton 31.12.1957. Mi plenigis miajn paperojn per normalaj informoj de mia naskiĝatesto-surogato, kaj poste venis al mi tiu dato. Dankon pro la donaco ! Sed nun, mi danku ankaŭ al homoj, kiuj sendas al mi gratulojn pro la reveno de unu el tiuj datoj, ĉu ne ?

Se mi festu datrevenon de mia naskiĝo, mi elektu 00/00/1957. Tamen, ĉar iuj ŝatus festi ne naskiĝtagon, sed nomtagon, la 18-a de aprilo tute bone kongruas kun mi. Nun multaj scias pri la 19-a de aprilo, ke tiu ĉi estas mia naskiĝdato. Tial ĉe la reveno de tiu ĉi mi ricevas salutvortojn de Esperantistoj. Neniu neesperantisto salutas min tiucele.

Festado de tiu datreveno ofertas plurajn surprizojn al mi en 2001.

Jam en oktobro 2000 la estraro ekproponis daton de la estrarkunveno de printempo 2001. Mi devas partopreni. Finfine la dato fiksiĝis je 27-a de aprilo. Mi do aranĝis mian vojaĝon al Roterdamo. Ĉe la aĉeto de la flugbileto montriĝis, ke la flugo el Lome (Togolando), kiu kongruas kun tiu dato kunvena estis okazonta la 18-an de aprilo, kaj la alveno al Amsterdamo, la postan tagon. Ĉar mi mem ne festas datrevenon, mi tute ne havas ideon, ke io tiam okazos ĉe mia flugado. Tamen, mesaĝoj de korespondantino Neli el Amsterdamo memorigis al mi, ke io povos okazi. Ŝi diris, ke tuj post mia veno, ŝi akceptos min en sia domo. Ŝi tiel pensis surprizi min. Ĉar mi tute bone komprenis la situacion, mi decidis eviti la akcepton.

En mia korespondado kun ŝi kaj aliaj pri mia vojaĝo, mi diradis: "Mi ofte estas laca. Pro tio, mi ŝatus ripozegi en Roterdamo atendante la tagon de la estrarkunveno. Kiam mi estos alveninta al la flughaveno de Amsterdamo, tuj mi iros al Roterdamo por ripozegi". Vere tio ĉi ne plaĉis al ŝi. Neli skribis mesaĝon al mi, en kiu ŝi aliel prezentis sian inviton.

Tamen mi povis rezisti, kaj tute rezignis : „Ne miru pri mia decido. Mi ĉiam dankas vin pro viaj helpoj al mi, kaj al mia familio, kaj vi nenion malbonan faris al mi. Sed, tuj post mia veno al Schiphol, mi iros rekte al Roterdamo“. Tion ĉi mi skribis al ŝi la 17-an de aprilo. Respondon ŝian mi ne ricevis, ĝis mi foriris la 18-an.

Kaj la flugado finiĝis. Bonŝance ĉe mia alveno al la flughaveno de Amsterdamo, mi ne vidis ŝin. Feliĉe mi veturis rekte al la Centra Oficejo en Roterdamo. Tuj la sekretariino tiea gratulis min pro la datreveno de mia naskiĝo : "Ĉu vere hodiaŭ estas la datreveno de via naskiĝo ? Do ankaŭ mi ion faru al vi !"

Simo Milojevic, la respondeculo de la libroservo ĉe la Centra Oficejo, tenis miajn du orelojn, por tiucele saluti. Amuze, ĉu ne ? Poste, mi tuj kuris al mia ĉambro.

Mi malpakis miajn aferojn kaj eniris la laborejon de la Ĝenerala Direktoro de UEA. Estis tri homoj tie : Pasquale, Istvan kaj Osmo. Mi nun ne memoras, kiu unue diris : “Ha Koffi, hodiaŭ estas la datreveno de via naskiĝo !”

Okazis manpremoj kaj gratulvortoj flugis de iliaj buŝoj al mi. Je la kvara horo ni pretigos kukojn kaj kunfestu, diris Osmo. Vere, mi hontis, ĉar tiu dato mem scias, kio ĝi estas sed por mi ĝi signifas nenion. Mi ne povis tion ĉi diri al ili, sed bonŝance, mi iris kun Pasquale al la laborejo de Marvin. Ne demandu min, kial ni iris tien, kaj kion ni faris tie. Sciu nur, ke tie mi parolis al Pasquale, ke li deduktu, ke mi ne aprobas la kunfeston pro tiu ĉi datreveno. Kutime mi ne festas datrevenon, mi diris al li. Mi estas tute indiferenta al tiaj aferoj. Mi neniam ion tian faris. Kaj poste mi kuris al BASIS por butikumi.

Kiam mi estis foririnta de Lome, mi decidis vojaĝi sen mia ventro. Mi ĉion pretigis, ke la ventro restu en Lome, ke mi vojaĝu sola. Tiel ĝi ne plu ĝenos min dum mia restado en Roterdamo. Ĝi ĉiam tion ĉi faras en Togolando. Ĝi restu tie kun siaj kapricoj. Mi ne povos plu elteni. Jen do mi alvenis al Roterdamo, kaj la ventro venis antaŭ mi. Hej ! Kia okazinta fakto ! Mi do akceptis la okazintaĵon, kaj tial mi butikumis. Manĝon mi pretigis, kaj kam la ventro jam estis plena, mi portis ĝin al telefono-aparato. Mi devis telefoni al Neli por informi ŝin pri mia alveno. Tuj ŝi petis, ke mi tuj venu al Amsterdamo.

Estis jam preskaŭ la kvara horo posttagmeze, kaj mi estis ironta per la trajno de 15 minutoj post la kvara. Mi iris al la sekretariino de la CO, kiu pretigis la manĝon por la festo en la CO. Mi klarigis, kial mi tuj migras al Amsterdamo. Ŝi rigardis la tuj manĝotaĵojn kaj diris : “Ni rezervos parton por vi, ke vi manĝu kiam vi estos reveninta”. Ne, ne estu tiel ; ĉar mi jam vidis ĉion, mi postulis tuj mian parton. Ŝi zorge pakis ĝin. Kukoj, kremo, ktp. saltis en mian manon. Mi grimpis supren kaj parolis al Osmo pri la invito. Apude, alia oficisto de CO atendis por adresi siajn gratulojn vortojn : “Koffi, hodiaŭ estas via naskiĝ-tago, gratulojn !”. Per rideto mi respondis al Clay. Mi devis plugrimpi por atingi la kvaran etaĝon, de kie mi prenis mian sakon. La remigrado malsupren pluirigis min al la stacidomo de Roterdamo.

Kvankam mi eltenis la veteron, mi diru, ke estis malvarme. La stacidomo troviĝas je 30 minutoj da piedirado mia for de la CO. Rapida marŝado kaj kuretado sinsekvis, kaj ŝvito kovris la tutan korpon. Ofte la ruĝa lumo malpermesis al mi ne rompi mian iradon. Ŝajnas, ke tiutage la ruĝaj lumoj decidis malfruigi min. Ĉiuj haltigis min, kaj minutoj tiel pasis, ke mi ne moviĝis. „Kiom ajn longa estas la nokto, la tago tamen venas“. De malproksimete mi vidis la horloĝon de la stacidomo : estis kvinono post la kvara. Almenaŭ la horloĝo tiam kompatis : mi kuris, kaj kuris, sed la montrilo tiam atendis, ke mi trafu la trajnon. Nur post kiam mi estis en la halo, ĝi removiĝis. Certe la horloĝo de la trajno estas malafabla. Kiam mi estis atinganta la kajon 8, ĝuste tiam la trajno adiaŭis min.

Malbedaŭrinde la trajnsistemo estas ege bone organizita, kaj la horloĝoj de la kajo vere simpatiaj kaj afablaj. Kelkajn temperojn poste alvenis alia trajno. Mi ensaltis. Dume, en la Centra Oficejo frandado de kukoj okazis memore al la naskiĝdato mia. Dankon al la oficistoj.

Mi devis atingi Amsterdam post unu horo da sidado kaj neniofarado.

Homoj kuradis ĉiudirekten. Mi povus demandi kien ĉiu iras, sed mi ne povis la nederlandan. Iam mi parolis la franglan kaj Esperanglan. Tiuj miksitaĵoj ne povis helpi. Grupo da homoj pasis antaŭ mi, kaj mi sekvis ĝin. Aperis koridoroj interkruciĝintaj. Tiaj aferoj ne ekzistas en Togolando. Tiam Neli estus atendanta min apud florvendisto. Mi elektis vojeton, kaj jen mi ekster la stacidomo. Ĉiuflanken ĵetitaj okulumoj vidigis floraron. Fulmrapide mia korpo atingis ĝin, dum mi mem ŝvebis en pensumado : ĉu ŝi jam venis, kaj ne vidinte min, reiris hejmen ? Mi ekkalkulis : kuris moneroj de mia poŝo en mian manon, poste bileto. La trajnbileto jam uzita vizitis la monerojn. La moncifero de la trajnbileto estis malpli granda ol la ciferosumo de miaj moneroj kaj monbileto. Bone : mi povus reiri al Roterdamo.

Certapaŝe mi reiris en la halon de la stacidomo. La horartabelo aperis granda antaŭ mi. Kurado ĉien de pasaĝeroj ofertis belan spektaklon. Hundego estis iranta al mi. Timeto ŝatus aperi, kaj tuj mi memoris mian patron. Kiam mi vekiĝis, mi trovis ne plu la hundon, sed bicikleton. Jen Neli !

Mi havas malsanon. Kiam iu rakontas pri manĝaĵo, kiu estas ŝatataĵo mia, mi tuj malsatas. Mia ventro tuj malpleniĝas kaj krias : “Koffi, replenigu min“. Certe ankaŭ ekzistus aliaj tiaj homoj. Ĝuste tial mi ne nun raportu pri la manĝaĵoj, kiujn Neli kaj Alexander pretigis por la festo. Estis vere agrablege. Mi ne rakontu plu, ĉar mia ventro jam avertas, ke ĝi tuj malpleniĝos. Deziroprimoj de Neli kaj ties edzo Alexander ŝutiĝis sur min. Donacegoj pluvis. Intereseĝaj bildoj paradis en la televidilo, trinkaĵoj fluis. Bonan feston al ĉiuj !

Kiom da kapoj, tiom da pensmanieroj. Tial, kiom da naskiĝdatoj, tiom da naskiĝfestoj. Vere, strangas, ke unu sola homo havas multajn naskiĝdatojn. Certe mi havas unu, sed ĝin mi ne konis. Neniu kulpas pri tio. La Providenco mem tiel aranĝis la tutan aferon. Ĝi intervenas ĝustatempe. Jen ĝi ĵus sonis al mi : ne plendu, ke vi ne memoras vian naskiĝdaton. Tion ĉi mi nun diru al vi. Vi naskiĝas en sankta tago.

Bonvolu noti tion, ke vi ne plu forgesu. Informu homojn, ke ĉiuj sciu tion. Dankon al la Providenco mi nun konas tiun daton. Estas tasko mia ĝin montri al ĉiuj. Tiun taskon mi faros en sankta tago; do la tagon de la sankta neniamo; jes, certe en triĵaŭda semajno.

III

En la *Manlibro por novaj membroj* Mark Fettes en 1992 skribis: “De pli ol 35 jaroj la Centra Oficejo de UEA troviĝas en Rotterdam, Nederlando. Post ses jaroj en luita ĉambro, en 1961 la Asocio aĉetis propran domon ĉe Nieuwe Binnenweg 176, kiun ĝi renovigis kaj pligrandigis en 1985-86. En la kvar etaĝoj troviĝas kvin ĝeneralaj laborĉambroj, grafikejo, ekspedejo, komputilejo, libroservo, malgranda konferencejo, kuirejo kaj manĝejo, la Biblioteko Hodler, arkivejo kaj du dormoĉambroj por volontuloj. Entute temas pri dudeko da ĉambroj.

Kutime inter 12 kaj 14 homoj (*aktuala listo de la oficistoj aperas en la Jarlibro*) laboras en la Oficejo, ne ĉiuj plentempe. Inter la konstantaj postenoj troviĝas

tiuj de la direktoro, sekretario, du kontistoj, redaktoro de la revuo Esperanto, kompostisto, libroservisto kaj ekspedisto. Tie laboras ankaŭ la konstanta kongresa sekretario kaj la Ĝenerala Direktoro de UEA.

Vizitantoj estas bonvenaj, sed ili estas petataj anonci sin antaŭe”.

Jen al ni Mark ĵus prezentis la CO-n. Nun ni povas viziti ĝin, ĉu ne ? Sekvu min do !

Post longa vojaĝo ni finfine alvenis al la enirejo de la CO. La vitra pordo estas fermita, sed tra ĝin ni vidas parton de la interno de la domo. Butono troviĝas ĉe la enirejo ; ni premu ĝin ; tiel ene de la ĉambro oni aŭdas sonoradon, kaj tuj iu de malproksime premu alian butonon. Ni do puŝas la pordon vitran, kiu malfermiĝas. Ni eniras. Tuj montriĝas du ŝtuparoj : unu irigas supren, kaj la alia malsupren. Per la supren-a ni atingas la duan etaĝon, kaj per la malsupren-a la teretaĝon.

Ĉe la unua etaĝo estas unu necesejo kaj du ĉe la teretaĝo (unu por viroj kaj unu por virinoj).

Post longa vojaĝo la vizitanto povas tuj malplenigi sin de rubaĵoj likvaj aŭ solidaj. Mark tute ne menciis necesejojn kaj duŝejon. Ni ne timu, ĉar estas aliaj necesejoj : unu ĉe la dua etaĝo, kaj alia ĉe la tria etaĝo ; tie ĉi estas ankaŭ duŝejo, kiun uzas la volontuloj. Se hazarde ni restas tie dum pluraj tagoj kaj rimarkas, ke la duŝejo estas preskaŭ ne uzata, ni ne miru pri tio. La oficistoj de CO ne duŝas sin tie ; eĉ se estas volontuloj en la dormoĉambroj, la duŝejo estas preskaŭ ne uzata. Ĝia uzado tute ne estas malpermesata. Ni Afrikanoj uzu ĝin ĉiutage, dum la Eŭropanoj mem uzu sian lavkuvon.

Ankaŭ la dormoĉambroj troviĝas ĉe la tria etaĝo. Mark menciis du dormoĉambrojn ; nun li sciu, ke, kvankam oni ne alkonstruis ĉambron, la nombro de la dormaj kreskis je unu : la ĉambro Arabio nun havas liton, kvankam plena je libroj, maŝinoj, ktp. Feliĉe dommusoĵ preskaŭ ne ekzistas en Rotterdam, se ne Arabio estus plenaj je musoĵ kaj blatoĵ.

Nun ni revenu al la unua etaĝo, poste al la elirejo de la domo. Certe ni ne volas eliri, sed nur rigardu dekstren ; estas pordo, kiu kondukas en la libroservon. Ni ne eniru, ĉar mankas nun tempo. Tion ni faros en la sekva ĉapitro.

IV

Ni sufiĉe longe ripozis. Nun ni daŭrigu nian promenadon en la CO. Ni estis supre, vidis la ĉambron Arabio, kaj fine revenis al la unua etaĝo.

La esprimo 'ĉambro Arabio' povas mirigi kelkajn. Jes, tio estas kutimo, ke ĉe la CO, ĉiu ĉambro havas nomon. Por nomi la ĉambrojn oni ofte uzas nomojn de personoj, kiuj donacis monon, ke la CO estu pligrandigita aŭ plibonigita. Sen donaco de almenaŭ 20.000 guldenoj. (se mi bone memoras la sumon) por ĉiu ĉambro, ne ekzistus Centra Oficejo de UEA. Estas pli komprenigenda jena afero: UEA estas la membroj, kaj la membroj estas UEA, ankaŭ koncerne la monon. La paĝo 27 de la jarlibro 2000 montras Centran Oficejon kun la nomoj de la diversaj ĉambroj.

Ni tamen ne forgesu, ke ni staras ĉe la enirejo de la libroservo. Ni povas eniri ĝin, sed tion ni faru ne tuj. Ni unue pripensu kiel ni iris supren al la tria etaĝo kaj kiel ni revenis.

La Centra Oficejo estas taŭga loko de personoj, al kiuj la kuracistoj rekomendas grimpadon. Kiu havas genuproblemon, tiu ne iru supren al la superaj etaĝoj. La oficistoj prave lokis la oficejon de TEJO ĉe la tria etaĝo, ĉar junuloj ne havos problemojn sportadi.

Ne ekzistas lifto, kaj oni devas per mallargha kaj vertikala ŝtuparo ligna ĉiam ĝemanta atingi la etaĝojn. Pli ol unu persono ne povas samtempe esti sur la ŝtuparo. Ĉiuj ŝtuparoj estas tiaj. Por iomete sportumi oficistoj multfoje iras kaj reiras la ŝtuparojn.

Problemon havas personoj kiuj kunportas pezan valizon kaj devas loĝi ĉe la tria etaĝo. Iam mi preskaŭ falis, kiam mi kuntrenis malsupren miajn plurkilogramajn sakojn. Se estus lifto, la irado estus pli simpla. Vere, mi neniam pensis, ke la Centra Oficejo de la tutmonda organizo, Universala Esperanto-asocio, ne havus lifton.

Mi jam plurfoje pasigis plurajn tagojn tie. Kelkaj oficistoj preskaŭ neniam venis al la tria etaĝo. Kiu laboras ĉe la dua kaj tria etaĝoj, tiuj ĉiutage, plurfoje vizitas la unuan kaj ter-etaĝon.

Ĉe la teretaĝo troviĝas la kafejo, kie ĉiuj oficistoj kaj vizitantoj kolektiĝas

por trinki kafon aŭ teon. Tiu kuntrinko okazas dufoje en la tago. Krome, nur unu printilon havas la CO, kaj ĝi troviĝas ĉe la unua etaĝo. Kiu laboras supre kaj ŝatus printi tekston, tiu donas la taskon al sia komputilo, kaj tuj kuras malsupren por preni ĝin. Kiu laboras ĉe la teretaĝo, tiu kuras supren por preni la printitaĵon. Tiel inter la taskoj de la oficistoj estas ankaŭ sportado. Nur la oficistoj, kies laborejo troviĝas ĉe la dua etaĝo estas preskaŭ ne sportistoj. Ĉu al la prizorganto de la libroservo estas de la kuracistoj malpermesite sporti ? Nur li ne bezonas sportumi, ĉar li povas ne uzi vertikalan ŝtuparon, sed plene laboras ĉiutage en la CO.

Ĉar por iri de la libroservo al la unua etaĝo aŭ al la teretaĝo oni ne bezonas vertikalan ŝtuparon, mi ŝatus, ke ni vizitu unue tiun ĉi ĉambron, kaj poste la aliajn.

Nun ni enmemiĝu por konsci pri la loko, kie ni troviĝas. Ni estas ene de la Centra Oficejo, ĝuste ĉe la elirejo, rigardante eksteren. En tiu pozicio unu pordo de la libroservo estas dekstre de ni kaj maldekstre troviĝas la ŝtuparo al la teretaĝo. Ni daŭrigu nian ripozon, ke ekde la kvina ĉapitro ni ekpromenu de ĉambro al ĉambro.

V

Ni staras ene de la CO, ĝuste ĉe la elirejo, rigardante eksteren. Dekstre de ni estas pordo de la libroservo. Ni do eniru tiun ĉi !

Per ŝtupareto ni atingis la teretaĝon. Tie ĉi troviĝas la libroservo. La respondeculo estas Simo Milojevic, la antaŭa Ĝenerala Direktoro de UEA. Li sidas antaŭ ekraneto metita sur rondforman vendobufedon. Ĉie estas libroj : sur la breto, en la kestoj de la vendobufedo, sur la planko, ktp. En la libroservo estas ankaŭ tabloj ; sur ĉiuj estas libroj. Ne nur libroj estas tie, sed ankaŭ diskoj, kasedoj, sakoj, ringoj, skribiloj, ktp. ĉiuj, esperantaĵoj.

Simo sidas tie la tutan tagon akceptante maloftajn vizitantojn. Kelkafoje homoj venas tien por aĉeti, sed la pli granda parto de la varoj vendiĝas perkoresponde : Esperantistoj rete, letere, telefone kaj fakse kontaktas la respondeculon de la libroservo por informiĝi kaj mendi. Simo kolektas la librojn, kiujn pakas Rob Moerbeek, kaj ofte ankaŭ Simo mem. La pakaĵojn ili poŝte sendas al la mendintoj.

Starante antaŭ Simo ĉe la vendobufedo, oni promenigas siajn okulojn en la ĉambro. Simo neniam permesas al la vizitanto silenti. Li havas diversajn trukojn por okupi : li ridigas per ŝercaj vortoj, farigas tasketojn, klarigas pri libroj, montras nove aperintaĵojn, ktp. La okuloj de la vizitanto povas kapti pordon en la libroservo. Tiu ĉi pordo kondukas al alia ĉambro, parto de la libroservo. Dum la butikoj mem de la libroservo nomiĝas Onisaburi Deguchi, la alia ĉambro havas la nomon Liech Walter. Tiu ĉi estas la stokejo. Vizitantoj povas eniri ĝin por rigardi la varojn novajn kaj ankaŭ malnovajn.

Se hazarde iu vizitis la CO-n, kaj tiam ne trovas la respondeculon Simo, li tute ne maltrankviliĝu, ĉar Simo dum laborhoroj ĉiam estas en la Centra Oficejo. Li, povas esti en la stokejo, kaj ankaŭ en la ĝardeno. Pri tiu ĉi ni parolos poste.

La libroservo estas la loko en la CO, kie oni devas uzi siajn fizikajn fortojn. Libroj envenas kaj eliras, kaj homoj estas bezonataj por porti ilin. Ĉiuj oficistoj devas labori. La Ĝenerala Direktoro tiam devas neglekti sian titolon, kaj porti librojn. La Direktoro de la CO, pli svelta, ĉiam emas porti pli. Ĉiuj aliaj oficistoj tial fariĝas portistoj. Ĝuste tiam, kiam venos vizitantoj, tiuj ĉi kredos, ke la subuloj laboras, kaj la ĉefoj mem sidas reĝe en siaj foteloj. Homoj, kiuj tiam vizitas la Centran Oficejon, tuj eniras la grupon por porti.

Kiuj konsideras sin ĉefo de ĉiuj, certe tiuj ne vizitu la Centran Oficejon, ĉar tie malaperas ofte la ĉefeco.

Iam, frumatene, ĉar ofte tiam mia lito jam estas forpelinta min, mi aŭdis sonoradon. Mi rigardis al la enirejo kaj vidis kamionon. Mi malproksimiĝis al la pordo, ĝin malfermis. La ŝoforo estas ne-Esperantisto. Li parolis iun

lingvon, kiun mi ne komprenis. Vere, mi ne plu memoras, kiel ĉiu el ni povis scii, ke la alia parolas la francan. Jen do mi komprenis, ke la ŝoforo devas porti librojn el la CO. Kartonoj da libroj jam kuŝas tie. Kion mi faru tiam, estante sola en la CO ? Porti kaj portadi, kaj tiel mi povas liveri ĉiujn kartonojn al la ŝoforo. Nederlando estas malvarma lando, sed tiam, kvankam en printempo ege malvarma, mi togolandanece ŝvitis. Mi faris tiajn laborojn pli ol du fojojn. Kaj se hazarde volontulo laboras kun Simo dum periodo de UK, tiam la portado fariĝas ĉiutagaĵo. Simo portadas, kaj ankaŭ la volontulo. Aliaj oficistoj aliĝas al la laborgrupo.

Nekredeble ! Mi neniam pensis, ke la oficistoj de UEA ofte, kiel portistoj en afrikaj bazaroj, portas pezajn bagaĝojn. Ĉiuj senescepte, direktoroj, sekretarioj, redaktoroj, ktp. demetas siajn renomajn vestojn, por porti tiujn de ŝarĝistoj. Ĉu ankaŭ la Ĝenerala Sekretario de UNO, Ĝeneralaj Direktoroj de UNESKO, MOS, ktp. kelkafoje surmetas vestojn de ŝarĝistoj ? Kial ĉe UEA la afero estas tia ? Ni do ne pravus kamparante UEA-n al tiaj organizaĵoj ?

Ni tamen ne senkuraĝiĝu ! Ni daŭrigu nian promenadon en la CO. Ĝuste apud la pordo de Liech Walter estas alia pordo. Tra ĝin oni iras al koridoro. En la posta ĉapitro ni atingos la koridoron, kaj tiam konatiĝos kun aliaj aferoj.

VI

En la kvina ĉapitro ni povis iomete resti en la libroservo de UEA. Ni klopodis eliri al la koridoro. Tion ĉi ni nun faras, ĉu ne ?

Ni iru tra la pordon troviĝanta apud tiu de la ĉambro Liech Walter. Ni atingas la koridoron de la teretaĝo. Ni povas halti. En tiu ĉi pozicio nia, se Simo estus en la libroservo, li vidus ne nian vizaĝon, sed nian dorson.

Irante dekstren ni atingas unu fundon de la koridoro. Tie estas la ĉambro Calado. En tiu ĉi estas nenio krom iloj, per kiuj s-ro Calado faras fojfoje riparetojn en la CO. Klopodante malfermi la pordon de tiu ĉi ĉambro, ni trovos maldekstre de ni alian, kiu kondukas al ŝtupareto. Per tiu ĉi oni atingas la pordon, tra kiun oni eliras el la CO. Nun ni ne eliru, kaj tial tute ne uzu tiun pordon. Ni do turnu nian dorson al la pordo de Calado. Jen la koridoro aperas tuta antaŭ ni. Ni iru antaŭen, rigardante jen dekstren jen maldekstren. Ni do malkovras plurajn ĉambrojn

a) Maldekstre estas laŭvice :

- La ĉambro Onisaburi Deguchi, kiun ni jam konas. Ĝi estas la libroservo de UEA.

- Aperas poste pordospaco : jen ŝtuparo, kiu kondukas al la unua etaĝo. La ilo lifto tute ne ekzistas en la CO.

- Plian paŝon antaŭen : jen la ĉambro Edwin Burg. Tiu ĉi estas manĝejo. Tie la CO-istoj kaj eventualaj vizitantoj pasigas la kafopaŭzojn. Entute du en la labortago : unu okazas matene ĉirkaŭ duono post la 10-a horo, kaj la dua posttagmeze, ĉirkaŭ la kvara. Tiam ĉiuj sidas ĉe sama tablo por trinki teon, kafon, lakton, ktp. La CO disponigas la trinkaĵojn kaj sukeron, kiujn oni uzu nur dum kafopaŭzoj. Kiu ŝatus frandi ion kune kun la trinkado de teo, kafo aŭ lakto, tiu mem havigu tion al si. Tamen, ni sciu, ke homoj CO-aj estas ne avaraj. Kiam unu havas ekzemple biskvitojn aŭ kukojn li invitas aliajn kunmanĝi.

Ni atentu, ke en la CO ne estas kelneroj aŭ servistoj. Ĉiu servas al si, kaj post la trinkado mem lavas sian tason. La Direktoro de la CO, la Ĝenerala Direktoro de UEA, ĉiuj aliaj oficistoj, kaj ankaŭ ĉiuj aliaj vizitantoj, eĉ la Prezidanto de UEA, aliaj estraranoj, ktp. lavas siajn tasojn. Tamen decas mencii, ke ne ĉiu kuiras sian teon. La sekretarino de la CO bonvoleme pretigas ĉion.

Tiuj paŭzoj estas la konvena tempo, kiam ĉiuj sidas kune por babili. Okazas diversaj rakontoj. Tiam la direktoroj informas la aliajn oficistojn pri sciindaĵoj kaj reciproke.

Mi ne volas paroli pri la stato de la ĉambro. Tamen mi ŝatus respondi al iu, kiu silente demandas pri la seĝoj en la ejo. Mi ne kalkulis, sed kredas, ke estus ĉirkaŭ dek seĝoj kaj tri tabloj.

La tabloj ne havas tukon, kaj la seĝoj ne estas turniĝantaj. Mi havas la impreson, ke kelkaj lokoj estas netuŝeblaj, ĉar rezervitaj al elektitaj personoj.

Tio okazas kvazaŭ iuj personoj havas fiksitajn lokojn. Mi tuj diru, ke ne estas tiel. Ĉiu rajtas sidi ie ajn.

Mi memoras, ke estas ankaŭ brakseĝo tie. Pardonu : en kelkaj domoj togolandaj tiaj estas plenaj je cimoj. La remburaĵo estas tiom ĉifita, ke vidiĝas la enhavaĵo. Mi kuraĝu diri, ke tiajn neniu oficejo en Togolando havas. Jes, tia estas la sidejo de UEA.

- La ĉambro Hideo Shinoda estas nomata komputila ĉambro. Fakte, tie estas ne multaj komputiloj sed preskaŭ nur la ĉefa komputilo de la CO. Mi ne scias, ĉu ankaŭ librojn oni nomas komputiloj ; en tiu ĉambro estas multe pli da libroj ol da lokoj.

- En la ĉambro Elfriede Ernst laboras Roy McCoy, grafikisto kaj komputilisto. Apud li estas komputilo kaj aliaj iloj por lia laboro. Promenante en tiu ĉi ĉambro, oni trovas alian pordon kondukanta al alia ĉambro : ĝia nomo estas P. H. Mooij. Sur la pordo estas skribita „fotoĉambroj“.

- La lasta ĉambro en la fundo de la koridoro, kaj kiu rigardas al la ĉambro Calado, estas la konferencejo de la CO kun dek ses seĝoj neturniĝantaj kaj kvar tabloj. Ankaŭ tie la tabloj ne havas tukon. Mi informiĝis, ke tiujn seĝojn kaj tablojn la CO havigis al si dank'al donaco de Kanadano. Tie okazas la diversaj kunvenoj en la CO. Ĝi nomiĝas Zamenhof. Tie estas ankaŭ televidilo ; sur muro pendantaj bildoj de ĉiuj prezidantoj de UEA, ktp. Certe la CO-istoj ne povas dum la laborhoroj spekti la televidilon. Ofte ĝin uzas la volontuloj dum noktoj.

Nun ni povas reveni al la ĉambro Calado por esplori la ĉambron de la dekstra flanko de la koridoro.

b) Dekstre, estas, laŭvice:

- Necesejo por virinoj.

- La ĉambro Mercej estas konservejo de la purigistino de la CO.

- Ankaŭ la viroj havas tie sian necesejon.

- Sekvas ĉambro, kiu ne havas nomon. Ĝi enhavas ilojn uzantajn por purigi la CO-n. Estante en tiu ĉi ĉambro neniu scius, ke malantaŭe estas alia. Tiu ĉi estas stokejo de paperaĵoj, precipe kovertoj.

- La ĉambro Heetkamp-Sensius estas unu el la plej grava de la teretaĝo ; ĝi estas la kuirejo. Tie la sekretariino de la CO pretigas la trinkaĵojn de la kafopaŭzoj. La pordo de tiu ĉi ĉambro kaj tiu de la manĝejo Edwin Burg estas vid-al-vidaj.

Tio ĉi estas bona ordo, ĉar la portado de la manĝaĵo de la kuirejo al la manĝejo ne daŭru longe. La kuirejo estas uzata pli de volontuloj ol de aliaj. Tie okazas internaciaj kuiradoj : Ĉinoj, Kroatoj, Afrikanoj, ktp. povas samtempe kuir. Jen do prezentiĝas diversaj manĝaĵoj. Dum iuj plaĉas, aliaj ŝajnas vomigaj. Mi havas ŝancon, ke la Providenco donis al mi la kapablon manĝi ĉion ajn. Tial mi povis ĝustumi manĝon de aliaj landoj. Tamen kelkafoje estas malfacile. Kiam estis preta manĝo ĉina, tiam pluraj ni estis tie. Nia malavara Ĉino donis iom al ĉiu el ni. La aspekto de la manĝo tute ne montras ĝin bongusta, manĝinda. Dum aliaj ne povis provi, mi metis ion en mian buŝon. Mi ne vomis, sed voris mian pladon kaj tiujn de la aliaj. Mi memorigu, ke mi manĝis ne en la ĉambro Heefkamp- Sensitius. Tie ĉi ni kuiras.

Mi tuj atentigu, ke dum la kuirado, oni atentigas la fumon, ĉar la domo estas protektata kontraŭ incendio. Kiam detektilo malkovras fumon, ĝi fajfas tiom forte, ke la tuta kvartalo maltrankviliĝas. Mi poste parolos pri la alarmsistemoj de la CO.

Mi tamen ne forgesu la tagon, kiam Rusino estis fritanta terpomojn. Tiam, matene, mi estis en la duŝejo. La bruoj de la alarmo preskaŭ elirigis min. Mi rapide finlavis min, kaj poste migris malsupren. Estis ege terura bruoj. Venis la Ĝenerala Direktoro, kiu silentigis la alarmilon. Tio tute ne signifas, ke oni ne kuiru tie. Estas antaŭvidita fenestreto, kiun oni malfermu, kuirante. Tiel la fumetoj eliros, ne-estante rimarkitaj de la detektiloj.

- La ĉambro Novzelando estas la ekspedejo. Tie laboras Rob Moerbeek, kiu faras la pakaĵojn sendotajn de la CO al la tuta mondo.

Jes, unu sola persono tion faras, kaj ne estas maŝino, kiu faru kelkajn laboretojn. Li uzas nur siajn manojn por ĉion fari. Ankaŭ aliaj oficistoj, kelkafoje pakas tie, kiam Rob ferias. Unu el tiu estas la respondeculo de la libroservo, Simo. Pordo troviĝas en tiu ĉi ĉambro.

Tra ĝin oni atingas alian koridoron, kiu kondukas ekster la CO. En tiu koridoro ofte Simo parkas sian biciklon. Mi vidis tie kolombojn, kiu venas por trinki. Kiu iam vizitis loĝejon de kolomboj en Togolando, tiu havos bildon pri tiu koridoro. Bone, ni ne restu longe en tiu loko, ĉar ĝi povus esti malpura.

- La sekva pordo kondukas ne al ĉambro, sed al la ĝardeno de la sidejo de Universala Esperanto-Asocio. Kia estus tiu ĉi ĝardeno?

Kiam oni parolas pri ĝardeno, mi memoras du aferojn : produktejojn de legomoj, kaj ripozejon sub arboj kaj inter floroj. Ni sciu, ke tiu de la CO estas nek unu nek la alia. Tamen ĝi utilas. Mi jam mencias pri fumo, kiu povas kriigi la alarmilon. Tial oni fumas ne ene de la CO. La ĝardeno do akceptas fumantojn. Ofte, kiam vi trovas homojn tie, sciu, ke la kialo estas tia. Tamen ne ĉiuj tie estantaj, fumas, sed okazas, ke la fumanto parolas kun iuj, kiuj estas devigataj sekvi lin tien. En la ĝardeno estas arbetoj kaj arbustoj sovaĝstataj. Unu el la CO-istoj ŝatas florojn, kaj tial akvumas kelkajn, kiuj tie estas. Bedaŭrinde li ne fumas, ke li povu pasigi pli da tempo en la ĝardeno. La folioj de la kreskaĵoj de la ĝardenoj tamen estas verdaj, ĉar ili tiom al kutimiĝas al la fumo, ke ili scias kiel rezisti al la nigriĝo.

Oni povas paŝi iomete en la ĝardeno. Tiel oni malkovros spaceton malantaŭ la konferencejo. En tiu loko estas brakseĝoj. Kvankam la loko tute ne estas rubejo, la seĝoj similas al ruboj pro sia stato.

Ni ne longe restu en la ĝardeno, ĉar hazarde veno de fumanto sendos nikotinaĵon en niajn pulmojn.

Ni eliru al la koridoro, kaj voju al la ĉambro Calado, kiun ni ne atingu. Ni grimpu la ege vertikalan kaj mallarĝan ŝtuparon apud la ĉambro Edwin Burg. Ni tiel atingas la unuan etaĝon. Ties ĉambrojn ni tuj vizitos.

VII

La teretaĝon ni ĵus vizitis. Certe ni memoras la ĝardenon, la kuirejon, la manĝejon, ktp. Jes, ne nur tiuj ĉi ĉambroj konsistigas la Centran Oficejon de UEA. Aliaj troviĝas ĉe la aliaj etaĝoj. Grimpinte la ŝtuparon de la teretaĝo al la unua, ni nun povas atendeti ĉe la elirejo de la ŝtuparo. Antaŭ ni estas manteloj. Ili apartenas al la oficistoj. Ni nun vizitu la ĉambrojn de la etaĝo.

Turnante nin dekstren ni trovas ĉambron. Mi ne kulpas, se mi nomus ĝin la sekretario de la Centra Oficejo. Ĝi tamen havas nomon : ĉambro Epstein. Tie laboras Atie van Zeist. En la Jarlibro 2000, kie aperas ankaŭ listo de oficistoj de CO, estas jena mencio : Atie van Zeist (sekretariado). Ŝi do estas la sekretario de la CO. Ni povas iomete memori la pretigadon de teo aŭ kafo por la paŭzoj : ŝi faras ĉion. Dankon kaj bonan apetiton al ĉiuj ni !

Inter la oficistoj estas iu, kiu konstante zorgas pri la laboroj de UK-oj. Nikola Rasic okupas lokon en tiu ĉi ĉambro kaj ĉiutage laboras. Ne nur homoj estas, sed ankaŭ labormaterialo, libroj, arkivoj ktp. Kiam oni staras ĉe la enirejo rigardante enen, oni povas maldekstren turni la kapon. Tie estas angulo. Certe ĝi estas stokejeto de skribiloj, glubendoj, gluo, tondiloj, ktp. Tiu ĉi ĉambro estas la plej vizitata de ĉiuj oficistoj, ĉar tien kuras ĉiuj por preni printaĵon.

En la CO estas nur unu printilo kaj unu fotokopiilo. Tiuj ĉi troviĝas en Epstein. Oficisto, kiu ŝatus ion printi, donas la taskon al sia komputilo, kaj poste kuras al Epstein por preni la kopion. Tien kuras ankaŭ tiu, kiu ŝatus fotokopii ion. Kaj tiuj maŝinoj tute ne apartenas al la CO. Ĉu mirinde ?

La zorgantoj pri la mono en CO estas ege kaj prave ŝparemaj. Tio ĉi estas ege necesa, ĉar la iomo, kiun havas UEA, tiu ĉi sobre uzu. UEA tute ne estas banko aŭ firmao, kiu lukras per siaj varoj. Ĝi vivtenas sin per donacoj kaj kotizoj de la membroj. Oni neniam kalkulu kun donacoj. Kiam oni havas iun, oni devas bone prizorgi ĝin, kvazaŭ neniu alia venus.

Tamen, eĉ se oni havas multe da mono, decas, ke oni utilacele kaj ne malŝpareme uzu ĝin.

La printilon kaj fotokopiilon en la CO luas UEA. La luigintoj respondecas pri la bona funkciado de la maŝinoj. Se hazarde iu ne funkcias, li devas anstataŭigi ĝin per alia.

Se oni kalkulas la koston pri luado dum iom da jaroj, kaj uzo de propraj aparatoj en tiom da jaroj, oni vidas, ke luado estas pli avantaĝa. Oni ne aĉetu aparatojn pro la emo posedi ilin.

Mi ege deziras trovi tiajn luigantojn en Togolando, por tuj havi fotokopiilon kaj grandan printilon. Bedaŭrinde tiaj ne ekzistas. Eĉ se ili ekzistus,

malmultus luantoj, ĉar ĉiu deziregus havi propran maŝinon. Vidu ! Ni iomete ekstertemiĝu !

Nun en landoj afrikaj furoras sektoj kristanaj. Homoj iras tien ofte nur por atingi celon, kiun ĉiu fiksas al si: junulinoj deziras trovi taŭgajn edzojn, junuloj taŭgajn edzinojn, komercistoj havi pli da mono, aliaj montri siajn luksajn vestaĵojn. La geedziĝa ceremonio donas tro da elspezoj al la geedzoj. Kvankam ili ne havas multe da mono, ĉiuj ŝatus havi la plej multkoston veston, kaj okazigi la plej imponan feston. La edzino portas sian vestaĵon geedziĝan unufoje en sia vivo, tamen oni elspezas pli ol dudek-oblon de sia salajro por havi ĝin. Se ĉiu povus sekvi la ekzemplon de la CO, la ŝuldoj de la jun-geedzoj reduktiĝus, ĉu ne ? Tamen ne ĉion ajn ni luu; la fekujon ĉiu havu mem. Ankaŭ la CO havas proprajn.

Atingante la koridoreton antaŭ Epstein, ni vidos antaŭ ni du pordojn: ĉe la malfermo de la unua maldekstre aperas fekuj. Ĝi estas necesejo. La dua pordo montras la ĉambron Riichi Kawakami: jen alia stokejo de la CO; paperoj, kovertoj ktp. estas tie.

Ĉie en la mondo la necesejo estas tre vizitata loko. Elirinte el ĝi, ni povas turni nin dekstren. La ĉambro Monte-Carlo aperas. La tri unuaj vortoj '*mon*' de tiu ĉi nomo povus informi pri la laboroj en ĝi. Ofte kiam oni eniras, la respondeculo Marvin Stanley tute estas nevidebla, kvankam li enestas.

Li ĉiam koncentriĝas antaŭ sia komputilo aŭ paperoj por senerare zorgi pri la kalkuloj kaj mastrumado de la ciferoj. Mi ne povas nun diri kiom da dosierujoj estas tie. Tamen mia demando estus: ĉu li en la jaro enigardas ĉiun almenaŭ unufoje ?

Marvin estas, kelkafoje en la librotena afero, helpata. Tiam en Monte-Carlo oni vidas du homojn. La okulvitretoj Zamenhofaj sur la nazo de Marvin efikas vere zamenhofece. Li senkulpigu min, se mi nun dirus, ke li havas kapon de Zamenhof, vere pensadantan kapon. Pro ĉiu financa afero, li tuj ŝatus konsulti la Ĝeneralan Direktoron. Tion li povas fari telefone, sed paperon li ne povas telefone montri. Ni nun kuru de Marvin al Osmo Buller.

La ĉambro Minaja okupas la Ĝenerala Direktoro Osmo de UEA. Tre vasta ĉambro. Ĝi ne estas apart-karaktera. Tie estas foteloj kaj normalaj seĝoj. Ĝia loko povus supozigi, ke ĝi ebligas al la Ĝenerala Direktoro

kontroli la en- kaj elirojn. Ĉiam koncentrigante pri siaj laboroj senĉesaj, li neniel povus havi tempon por io tia. Tamen ankaŭ li, kiel ĉiuj aliaj, kuras por malfermi la pordon al iu, kiu ŝatus eniri la domon.

Ni povas iomete inspekti la ĉambron.

Li havas sian labortablon, kaj apud ĝi bufedeton por sia komputileto. Alia tablo tie surhavas librojn kaj dokumentojn. Ankaŭ granda ŝranko enhavanta Esperantaĵojn.

Eble mi, en Togolandano, pensis, ke la laborejo de la Ĝenerala Direktoro de UEA estos pli impona ol tiu de ministroj ĉi tie. Mi ne volas nun ĉi tie fari komparojn. Mi vizitis laborĉambron de posedanto de ciberkafejo en Togolando. Ne-imageble, ĝi estas multe pli impona.

Mi ŝatus diri al samkontinentanoj, ke la ĉambroj ĉe tiu ĉi etaĝo tute ne estas escepte belaj/luksaj. Ekzistas en Afriko ĉambroj multe pli belaj kaj ekipitaj ol tiuj ĉe la unua etaĝo de la CO. Tamen ni ankaŭ rekonu, ke ekzistas aliaj ĉe ni ĉi tie, kiuj estas vere aĉaj, tiom, ke ili tute ne estas loĝeblaj; tamen homoj loĝas tie.

Certe ĉe la dua etaĝo ni trovos aliajn ĉambrojn. La ĉapitro VIII certe donacos vortojn pri tiu ĉi etaĝo.

VIII

Je kio estas komparebla la bruoj? Onomatopeo interveni: “Paf! Paf! Paf-!”. Ne, tio tute ne taŭgas. Alia venu: “Pum! Pum! Pum!”. Tiu ĉi iomete similas je la afero. Tamen ni vidu ceteran: “Bum! Bum! Bum!”. Ankaŭ tiu ĉi ne tute taŭgas. Mankas vortoj por aŭdigi la bruon.

La CO tute ne estas uzino, tamen tie ofte aŭdiĝas bruoj. Tute ne temas pri ĝemado de la ŝtuparo de la domo, kiu eĉ sub la pezo de formiko plendas. Kiel diras ŝercemulo “Mi timas, sed mi ne krias”. Analoge, la ŝtuparoj de la

CO dirus : “la pezo eĉ de formiko estas granda ŝarĝo por mi, sed mi ne ĝemas. Mi facile eltenas kiel la kano en la fablo de *La Fontaine* kiu diris : “mi faldiĝas, sed ne rompiĝas.””.

Necesas esti en iu ĉambro de la unua etaĝo por sensumi pri kio temas. Ĉar ni estas ĉe tiu ĉi etaĝo, ni povas atendi kelkajn minutojn por vidi, ĉu io okazos. Ne, tion ĉi ni ne faru, ĉar la tempo mankas. Ni do voju al la dua etaĝo por viziti ties ĉambrojn.

Ĵus elirinte de la ĉambro Minaja jen ni tuj atingis la ŝtuparon al la dua etaĝo. Ni supreniru ! Tute ne, ĉar jen de supre estas venanta iu. Ŝajnas, ke la ŝtuparo estas tre kuraĝa. Ĝi perfekte ĝemas. Bone, nun ni iru supren. Ĝuste kiam ni atingas la unuan ŝtupon, ekaŭdiĝas la bruoj. Momenton ! ‘Bum ! Bum ! Bum ! Bum ! Bum ! Bum !’. Ho jes, nun ni komprenas la bruojn. Bone, nun ni povas iri supren, ĉar la redaktoro de la revuo *Esperanto* jam pasis. Certe li iras al la ĉambro Epstein de la teretaĝo por preni printaĵon. Ni rapidu, ĉar li povos tuj reveni.

Ĉe la antaŭo de la unua etaĝo, pordo kontraŭas nin. Ĝia nomo estas ĉambro Aŭstralio. Ni staras rekte rigardante tiun ĉi ĉambron. Dekstre de la ŝtuparo estas necesejo. Ankaŭ tie ĉiu rajtas ‘deŝarĝi’ sin. Ni provu eniri. Ĝi estas fermita. Eble la Direktoro de la Centra Oficejo, kies laborĉambro Stefano La Colla troviĝas tuj post la necesejo dekstre, tie ion purigas. Mi ne ŝatus diri, ke li estas purigisto. Kiu iam restis plurajn tagojn en la CO, tiu konstatos mem, ke li faras ĉian ajn laboron en la sidejo de UEA.

Ni tamen restu ĉe la eniro rekte rigardante la ĉambron Aŭstralio. Maldekstre de tiu ĉi ĉambro estas alia, ĉambro Kanado. Ĉambreto kontraŭas la laborĉambron de la Direktoro de la CO. Ĝi estas Simon Saft.

Ĉu la CO-istoj permesas, ke ni vizitos ilin ? Ĉiuj ĉambroj estas malfermitaj al ĉiuj. Ni vizitu ilin, unu post la alia.

Unue al la direktorejo ! Ne miru vidi tie malgrasan homon sveltan, kiu tiam ordigas la aferojn en la ŝranko. Certiĝu, ke li estas la Direktoro. Se vi ne kredas, diru ‘Pasquale’. ‘Hej’, li tuj respondas. Jes, mi jam tion diris al vi, li estas la Direktoro de la CO. Vidu mem, li ridetadas kaj ege malrapidege respondas viajn salutojn.

Unu tablo, unu ŝranko, tri seĝoj por vizitantoj kaj unu pli luksa por li mem. Ofte seĝo de estro estas kvazaŭ sankta, kiun uzu nur la estroj. Neniu alia rajtas meti siajn gluteojn sur ĝin. Certe vi scias pri la registemoj en iuj

landoj. Soldatoj intervenas por renversi ŝtatestron aŭ reĝimon. Jes, tio estas putĉo. Jen togolanda dirmaniero : ‘oni rabis de li la seĝon’.

Iam prezidento estas tiom minacata, ke li tute ne scias plu kion fari. Demisio tute ne estas la bona solvo, ĉar tuj la soldatoj kaptos lin kaj enkarcerigos. Li tial fariĝis pupo, kiu plenumas nur la ordonojn de la soldatoj. Vere la laboroj tute ne estis facilaj. Iam kolegoj vizitis lin en la prezidentejo. Li devis paroli. Vere kiuj nun havas problemon pri la diferenco inter *kun* kaj *per*, ankaŭ tiuj ĉi povas kompreni kio sekvas.

La prezidento rigardas al la seĝo plore kaj diras: “Ho, seĝo, kion vi ŝuldas al la soldatoj. Ĉu vi kulpas pri io ? Ĉu mi kunkulpas ? Ili prenu vin kaj lasu min libera vivi mian simplan vivon”.

Vere ĉiuj vizitantoj ne povis elteni la situacion. Larmoj aperas tie : ĉiuj *kun/per* larmoj esprimis sian doloron. Finfine la soldatoj rabis la seĝon, kaj jam pli ol tridek jarojn soldato gardas ĝin. Neniu plu rajtas alproksimiĝi al ĝi. Kiam iu hazarde montris sian ŝaton al la seĝo, tuj li finas sian vivon. Ĉu io tia koncernas la seĝon de la Direktoro de la CO ? Eta rakonto helpas al vi prijuĝi.

Mi vizitis la Centran Oficejon pro/por estrarlaboroj. Tiam mi devis laboreti perkomputile. Pasquale, ne trovinte liberan komputilon, diris, ke mi uzu alian. Kiel tio eblas ? Ni unue ŝanĝu pozicion de aferoj sur la tablo, ke mi uzu unu el la seĝoj por vizitantoj. “Sidu tie sur mia seĝo por labori”, diris Pasquale. Vere estis al mi ege malfacile tolerebla. Ĉu fari aŭ ne fari? Fari estas kvazaŭ profani la seĝon. Ne fari estas kvazaŭ rifuzi la afablon de Pasquale. Vere, li sincere kaj tute plenkore invitis min sidi sur la seĝo. La laboro, kiun mi devus fari en maksimume dudek minutoj, okazis en pli ol unu horo. Kiam mi estis komencinta la laboron li foriris lasante min sola en la direktorejo. Vizitanto, kiu tiam envenis, nomus min nova Direktoro de la CO. Feliĉe mia kamparaneca vizaĝo montrus min ne tia. Tamen dankon, Pasquale, pro la bondeziro. Mi neniam ŝatas esti estro. Nur cirkonstanco altrudas tiajn laborojn al mi. Mi faras ilin, neniam menciante mian titolon. Vere tio pezas sur min. Mi hontegas, kiam oni nomas min tia.

Gravas ne la titolo, sed la laboro. Pasquale, certe tion vi certe scias, kaj aplikas. Tial vi estas ĉie en la CO, farante ĉian ajn laboron. Mi ne scias, ĉu tiam en julio 2001 vi sciis, ke vi demisios en aŭgusto samjara. Kia fariĝos via seĝo ? Ĉu sankta ? Ĉu simpla ? La respondo ni ne bezonas nun, ĉar la vizitado de aliaj ĉambroj urĝas.

Ni eniru la ĉambron Aŭstralio. Kvankam estas bretaro kun libroj, ni certiĝu tamen, ke ne ĝi estas la biblioteko de la CO. Tie laboras la redaktoro Istvan Ertl de Esperanto kaj Francisko Veuthey. Jen Istvan kuras malsupren por preni alian printaĵon. 'Bum ! bum ! Bum !'. Ĝis revido, Istvan. Li respondis, kaj lia voĉo tute ne mirigas, ĉar 'Bum ! bum !' jam aludis pri tio : estas iom interese raŭka, sed tute bele komprenata. Vera oratoro.

Nun la sidloko estas libera. Sur la tabloj estas multaj aferoj. Apude li havas ordigitajn dokumentojn, kiujn li uzadas. Lia komputilo Makintoŝa estas unu el la du en la ĉambro. Francisko uzas alian. Tute ne miru pri la librozeco de la ĉambroj en la CO. Vere estas tro da paperoj. Mi timas, ke iam la domo krakos. Tiu librozo estas ne nur malbona, ĉar la libroj ĉiel utilas. Por komforte labori per sia komputilo kaj iel malpliigi tro da kurbigo de la korpo, Francisko estas helpata de sia komputilo. Tiu ĉi havas sub si librojn, sur kiuj ĝi sidas. Tiel Francisko malpli ĝene laboras. Oni devus kompreni, kaj adaptus la laborlokojn al la laboroj. Ĉu ne eblas havi materialon, tiel ke la komputilo ne sidu sur libroj ?

Ni ŝatus vidi librojn, do ni iru al la biblioteko de la Centra Oficejo de UEA.

Tuj mi diru al vi, ke tute ne temas pri biblioteko, kiu povas akcepti multajn legantojn. Iam mi vizitis Finnlandon. Miaj gastigantoj estis tro legemaj. Ni vizitis bibliotekon. Vere ĝi estis tro granda. Tian mi neniam vidis en Togolando. Sed la biblioteko de CO estas nur librogardejo, ĉar la deko da seĝoj kun du tabloj tute ne sufiĉas, ke dudek homoj sidu tie por legi. Tamen tie estas buntaj libroj. Esploremuloj tie trovos ĉion pri nia movado. Povas okazi, ke iam muziko aŭdiĝas tie. Eniru kaj vi trovos, ke iu laboras tie. Dikulo, Bart oni alnomas lin. La Jarlibro 2001 montras : Bartolomeo Ruigrok. Li estas la respondeculo pri la biblioteko de UEA, kiu nomiĝas Biblioteko Hector Hodler. Bart estas parttempa laboranto tie. Ĝuste tial ne ĉiutaga estas la muziko. Li ne estas muzikisto, nek muzikema, sed lia

muziko estas kuracilo por li. Jes, formo de muzikoterapio. Pri la muziko ni ne zorgu.

Nin intereso la valorajoj de la biblioteko. Kion vi bezonas, tion diru al Bart, kaj li tuj trovos ĝin por vi. Tie estas unu komputilo, en kiu estas informoj pri ĉiuj dokumentoj de la biblioteko Hector Hodler : jarlibroj, revuoj, magazinoj, kasedoj, enciklopedioj, ktp. Mirinde !

Jes, mirinde ! Mi tute ne antaŭe kredis, ke estas surstratuloj en evoluintaj landoj. Almozuloj, frenezuloj, drinkuloj ekzistas ĉie. Monerojn iuj jam ricevis de mi. La konduto de eksterafrikaj tiaj homoj tute ne malsimilas tiujn de afrikaj. Ĉiu homo estas homo, kaj nenio pli aŭ pli. Kial ni devas forlasi bibliotekon por aliri stratulojn ?

Iam mi vizitis bazaron en Togolando. Promenante mi atingis standon. Neniu estis tie, sed estas varoj ordigitaj sur breto el lignaĵoj, kaj aliaj misorde sur la planko. Mi tute ne komprenis kial neniu estas tie. Kiam mi estis tute apud la budo, jen sub malpuraj kartonoj io moviĝis. Mi tuj rimarkis la staton de la budo. Ĝi tute ne temas pri vendataj aferoj, sed estas loĝejo de frenezulo. Ne ulo, sed ulino. Ŝi tuj diris :

- Vi vekis min. Vi donu kompensmonon.

Mi ne hezitas doni ion en tiaj okazoj. Kiam ŝi estis preninta la monon, ŝi tuj kovris sin per la kartonoj. Certe ŝi atendis venon de alia. Mi ĉiam memoras tiun aferon, ĉiufoje kiam mi vidas lokon similan je tiu stando. Lokoj kun tia stato en togolandaj domoj estus plenaj je musoj, cimoj, blatoj, ktp.

Vere, la unuan fojon, kiam mi eniris la ĉambron Simon Saft, mi tuj trovis min antaŭ tiu stando, tiu malpura ejo. Feliĉe tie mankas la ulino kaj malutilaj bestetoj. Nur tio ĉi estas la diferenco

Ĝis baldaŭ !

En la ĉambro Simon Saft neniu povus dormi. Tamen, kiu scias, ke iam, pro manko de loko en la CO, tien oni metus liton, ke vizitanto pasigu almenaŭ unu nokton tie. Ĉar ne jam estas lito tie, ni eliru, kaj voju al Stefano la Colla. Ho ne ! Ni ne iru tien, ĉar la ŝtuparo por iri al la tria etaĝo estas pli proksima al Saft. Ni povas supren grimpi .

Jen ni alvenas al la tria etaĝo, jes ĉe balkoneto : tableto estas tie. Sur ĝi estas io, ekzemple paperoj, skribilo, ktp. Estas skribitaj la nomoj sur pordoj : ĉambro Arabio, Sveda ĉambro. Estas ankaŭ necesejo. Se ne estus volontulo en la CO tiu tria etaĝo estas ĉiutage preskaŭ dezerta. Ĝi estas preskaŭ posedaĵo de TEJO, ĉar tie troviĝas ĝia oficejo : ĝi havas la nomon Salberg. La Sveda ĉambro estas dormejo kun normala lito dupersona. Tie dormas volontuloj de la CO. Alia dormejo estas tie. Ĝi estas la ĉambro Frank Netrval. Ni povas viziti ĝin.

Elirante el la Sveda ĉambro ni trovos dekstre pordon : jen la ĉambro Liech-Walter, la oficejo mem de TEJO kun unu komputilo kaj multaj dokumentoj. Ni trairu ĝin por atingi la dormejon de TEJO. Jes, estas lito duonpersona. Alta homo dormanta tie atentu la tegmenton, ĉar la ĉambro estas subtegmenta.

Mi neniam diros, ke mia kapo ofte karambolas kontraŭ ĝin, kiam mi estas vekiĝinta kaj ŝatas tuj stari. Kiel en la Sveda ĉambro, ankaŭ tie estas tablo kaj seĝo por ke enloĝantoj povu labori. Estas ankaŭ lavkuvo, breteto, io ŝrankeca por vestoj, ktp.

Koridoreto kondukas de Liech-Walter al alia koridoro. Ni ne tuj iru al tiu ĉi. Ĵus antaŭ tiu koridoreto troviĝas pordeto. Tie estas lavmaŝino. Ne homojn oni lavas tie sed vestoj. Tamen mi povus inciteti homojn, kaj eĉ eksterafrikanon. Aŭdu !

Mi estis tie kiam iu vizitis la CO-n. Mi miamaniere prezentis al ŝi/li la domon. Kiam ni estis ĉe la lavmaŝino, mi diris : “Vi Eŭropanoj estas geniaj. Vi havas eĉ maŝinon por lavi homojn. Jen unu, kiun havas la CO”.

Tuj la persono eksaltis, senkonscie montrante, ke mi mensogas. Mi devis pluparoli : “Mi tute ne plu bezonas iri en la duŝejon por lavi min, ĉar tiu maŝino perfekte lavas min. Ĝin mi ĉiutage uzas. Iam paneis en la duŝejo kaj estis malpermesate duŝi. Mi ĉiam uzas la lavmaŝinon por lavi min.

Mi povos montri al vi kiel oni uzas ĝin. La maŝino havas multajn kapablojn, kiuj ni ne jam ekspluatas, eĉ la fabrikantoj de la maŝino tion ne scias. Poste mi montru al vi, ke vi provu hejme". La vizitanto mire rigardis min kaj ridetis. Ĉu ŝi/li kredis tion ?

Minutejoj pasis, kaj foriro devis okazis. Mi akompanis ŝin/lin iomete for de la domo, kaj kiam disiĝo estis okazinta, ŝi/li diris : "Ho, vi ne montris al mi ! Ĉu ni reiru ?". Tuj mi respondis : "Ni reiru tuj ! Mi tute forgesis pri tio. Ni reiru".

Kelkajn paŝojn antaŭen kaj li/ŝi haltis : "ne , estas jam malfrue. Alifoje!". Tiu ĉi 'alifoje' neniam venos, ĉar kelkajn tagojn post la disiĝo okazis telefonvoko ridoplena : "vi estas tro ŝercema. Kiom stulte mi povis kredi vin".

Ni ne tro restu apud tiu ĉi lavmaŝino. Ni reriu al la balkoneto kaj de tie al Arabio. Ĝin mi en julio 1999 nomis 'Adanifejo'. Kial ?

En 1993 devis okazis elekto prezidenta en afrika lando. Pro malseriozeco de la registaro la opoziantaro rifuzis partopreni. Estus hontego se la ĉiama prezidento estu sola kandidato. Tial iel oni povis trovi iun, veran opoziciananton ege trankvilan. Estis entute tri kandidatoj, kaj ĉiu kampanjis. Adani Ife estas unu el la kandidatoj. Lin oni intervjuis : estis ege malfacile. Li organizis siamaniere sian kampanjon, kaj malfacile estis trovebla ion por diri al la popolo. Ĵurnalistoj serĉadis lin. Estas tamen koniginde, ke li estas tre klera homo ege kulturigema. Lia domo estas pli ol biblioteko. Neniu libera loko estas en la domo. Ĉie en la domo estas libro : en la manĝejo, sur lito, en divanoj, en necesejo, en banejo, ktp. Onidire, kiam li dormas en sia lito, libroj kovras lin, ke oni ne povas rimarki, ke li estas en la lito.

Ĵurnalista pro la elekta afero serĉadis lin. Tagejoj pasis, kaj jen finfine lin oni trovis inter libroj. Nur la kapo estis videbla. Li tamen estas universitata profesoro. Ĉu tial li havas librozan domon ?

Ankaŭ la ĉambro Arabio estas tiom libroza, ke dormi tie similas al dormi en la domo de Adani Ife. En julio 1999, irante al la Germanio por partopreni la tiaman UK-on pro mia estraraniĝo al UEA, tie mi devis dormi. La Sveda ĉambro kaj Franck Netrval estis okupataj. Jes, mi dormadis inter libroj en lito ĉirkaŭitaj de librobretoj. Ĉie en la ĉambro estas libroj, kartonoj. Ankaŭ neuzatataj komputiloj kaj kopimaŝino estas tie. Mi provis trovi lokon

por miaj vestoj, kaj tie vivis kiel Adani Arabio estas vera Adanifejo. Vizitu ĝin kaj vi vidos mem.

Nun ni povas viziti la koridoron. Dekstre estas unue la duŝejo, kaj poste la ĉambro Albert. Ĉu mi rakontu ion pri tiu duŝejo ?

Mi tute ne komprenas, kiel Afrikanoj en Eŭropo ŝatas lavi sin multfoje en la tago. Same mi miras ankaŭ pri Eŭropanoj, kiu en Togolando preskaŭ neniam lavas sin dum sia plurtaga restado. Eble kulpas la kutimo.

En mia Togolando, ĉiutage mi lavas min almenaŭ unufoje en la tago. Eksterafriko mi ne povas ne fari tion. Tial ofte nur mi uzas dum pluraj tagoj la duŝejon de la CO, kvankam estas volontuloj. En Berlino mi loĝis en pensiono kune kun multaj aliaj homoj eksterafrikaj. Estis ankaŭ Raoul. Estis kvar duŝejoj kaj du necesejoj. Dum la tuta semajno neniun krom Raoul mi vidis lavanta sin. La duŝejoj estis preskaŭ neuzataj, sed ĉiam svarmas homoj ĉirkaŭ la lavkuvo, kaj ankaŭ vico da homoj atendas por feki. Nur la duŝejo suferis je manko de sin lavantaj homoj. Raoul kaj mi konsolis ilin, ĉar ĉiutage almenaŭ unufoje ni salutis ĉiun. Tiam mi tute ne pensis, ke reen al Roterdamo lavkuvo sin altrudos al mi.

De Berlino mi iris al Ĉehio. Tiam Raoul revenis al Roterdamo. Reveninte de Ĉehio per tutaga veturada trajna mi bezonis lavi min. En la duŝejo mi estis, kiam Raoul informis pri la novaĵo : estas malpermesate lavi vin nun, ĉar tuboj rompiĝi kaj akvo de lavado malsekigas librojn en Onisaburi Deguchi. Tion mi ne povis toleri. Mi demandis la Direktoron de la CO pri tio. Lia simpla respondo estas : uzu la lavkuvon.

Ĉu lavkuvo povus kontentigi min ? Ĝi utilas nur por la lavi la vizaĝon sed ne la tutan korpon. Ni do estis tiel petataj uzi la kuvon. Feliĉe niaj amikoj en la CO komprenis nin. Simo jam proponis sian duŝejon al Raoul, kaj ankaŭ Osmo sian al ambaŭ ni. Ni ne ĉiutage devis ĝeni ilin. Tial ni trovis manieron lavi nin, ĝis la tuboj estis riparitaj. Nun mi ne plu memoras kiom longe daŭris la malpermeso : certe pli ol unu semajno. Tiam kvankam estis volontulo eksterafrika en la CO, plendis nur Raoul kaj mi, sed li, neniam. Do dum tuta semajno li uzadis la lavkuvon. Mi povas resti tiom longe kiom mi volas en la duŝejo; neniun venos por lavi sin. Tamen mi eliru por montri al vi la lastan ĉambron de la CO.

En la Jarlibro 2000 de UEA estas skribite, ke la ĉambro Albert estas arkivejo. Ĝi estas ege grava por la Afrika Agado. Preskaŭ ĉiuj korespondaĵoj de Hans Bakker kun Afriko dum pli ol dudek jaroj troviĝas tie. Kartonegoj da leteroj montrantaj kondutojn diversaj de afrikaj Esperantistoj troviĝas tie. Ankaŭ malnovaj periodaĵoj *Esperanto* troviĝas tie. Kiom da paperaĵoj en la CO !

Mi nun havas alian pruvon pri pezo de libroj. Ĉe tiu ĉi tria etago vidiĝas multaj fendoj. Mi timas pri baldaŭ disfalo de la tuta domo sub la pezo de la libroj. La domo estas laca, kio pruvas ĝia ĉiama ĝemado. Plafono de la tria etaĝo estas signo de la malbona farto de la domo. Kvankam troas la pezo, ankaŭ en la subtegmento estas aliaj pezigaj aferoj : en nigra mallumo estas kartonoj kun neuzataj aferoj. Mi vane kun Roy tie serĉis skanilon eksmodan destinata por rubejo. La subtegmenton mi ne nomu musolando, sed se tian vi vizitu en Togolando araneaĵoj, blatoj, musoj, ruboj, ktp. tuj bonvenigus vin. Feliĉe tiaj preskaŭ mankis en la CO.

Kioma horo nun estas ? Jam la dek-dua nokte. Jam ĉiuj oficistoj estis for de la domo. Mi ŝatus vidi la fundon de la koridoro sub la plafono. Tion mi ne faru tuj, ĉar mi ne scias, ĉu oni jam enŝaltis la alarmon. Jen alia afero en la CO, pri kiu ni sciu. Sekvaj linioj parolos pri la alarsistemo en la CO.

La 86-a UK de Zagrebo fermiĝis la matenon de la 28-a de julio 2001. Tiam mi devis resti la tutan tagon en Zagrebo por reiri al Roterdamo la postan tagon. Ne nur mi pasigis tiun tagon tie, sed estis ankaŭ aliaj Esperantistoj. Post la fermo de la kongreso mi revenis al mia loĝejo kaj poste reiris al la ĉefa kongresejo. Nur kelkajn minutojn post la fermo de la kongreso ĉiuj partoprenintoj malaperis. La kongresejo estis preskaŭ malplena. Nur kelkaj homoj estis tie. Ankaŭ mi, kiu tiam rekonis Brazilaninon, estis tie. Mi memoris ekskurstagon en Telavivo: Brazilanino Maria malaperis, kaj tial nia buso devis atendi longe, ĝis ŝin ni retrovis. Tiam alia Brazilanino preskaŭ priploris sian samlandaninon Maria. La vizaĝo de la priplorinto mi tute ne forgesis. Tiun vizaĝon mi vidis ĉe la kongresejo. Mi alproksimiĝis kaj demandis pri Maria.

Tuj ŝi memoris la tutan historion kaj ni ridegis. Minutoj pasis, kaj ni interbabilis. Ŝi demandis pri manĝejo. Kvankam mi ne parolis la kroatan kaj sciis nenion pri la urbo, mi akompanis ŝin al manĝejo, kie ŝi manĝis. “La panon mi tre ŝatas. Ĝi estas tre bona”. Tion diris Eliane Gauze, manĝinte. Vere, la pano estis bonega. Tion diris ankaŭ Osmo, la Ĝenerala Direktoro de UEA. Jes, ankaŭ la Direktoro Pasquale Zapelli de la Centra Oficejo. La prava demando estus : ĉu ankaŭ ili vizitis la manĝejon ?

Pasquale estis en la libroservo de la kongresejo, kiam mi estis ironta ien por manĝi. Tuj li ŝercis : ‘ne iru al tiu manĝejo...’. Li plumemoris la manĝejon, la panon, ankaŭ la kolbason. Vere estis bongusta. Kiu iam aŭdis pri mia vegetaraneco tuj demandas : ĉu kolbaso ne estas viandaĵo ? Vorto tiama de Pasquale respondu la demandon : “laŭcirkonstance”.

Bone, kiel mi malkovris la manĝejon ?

Ni alvenis la 20-an de julio 2001 al Zagrebo en la vespero. La ventro tute ne forestis. Tial ĝin ni kontentigis. Francisko kaj Clay (oficistoj) de CO jam kelkajn tagojn antaŭe estis en la urbo. Ili do venigis nin al restoracio, ke ni manĝu.

Pano, kolbaso, tomato, ktp. (bonvolu Osmo kaj Pasquale kompletigi la liston). Dum io eniras la buŝon, aliio eliiras el ĝi. Tio ĉi okazis en la restoracio.

Ĉe la manĝotablo okazis babilado, dum kiu mi kiel kutime ŝparis miajn vortojn. "Tiu ĉi kolbason mi tre ŝatas", diris ne mi, sed ankaŭ mi devus diri tion, ĉar vere estis bonega manĝaĵo. Ne nur pri la manĝaĵo elbuŝiĝis vortoj. Tiam Osmo rimarkigis : "Ĉu Togolandanoj estas tiom inteligentaj, ke neniu el ili jam bruigis alarmon en la CO ?" Jes, en la sidejo de UEA estas ne nur libroj kaj seĝoj, sed ankaŭ la domo estu protektata kontraŭ ŝtelo kaj brulego. Tial funkcias alarmistemo, kiun ĉiuj laborantoj aŭ loĝantoj en la CO scietu ŝalti. Iom da neglekto bruigos la alarmon tiom, ke la tuta kvartalo maltrankvilĝas. Kiel statas la tuta afero alarma ?

Mi konfesu, ke mi ne tute scias pri la sistemo. Tamen mi diru, ke estas du detektiloj : unu de ŝtelistoj kaj la alia de fumo. La unuan oni devas ĉiutage enŝalti kaj poste elŝalti. Kiam ĝi estas enŝaltita, neniu plu promenu en la koridoroj de la CO. Ĉiu estu en ĉambro. Ĝuste tial dum la laborhoroj ĝi ne estas enŝaltita. Necesas, ke iu aperu en koridoro dum la enŝaltita periodo, kaj la alarmo aŭdigas vere malagrablan bruon. Samtempe signaloj atingas la sidejon de brigado kontraŭŝtela. Tiu ĉi ne tuj kuras al la CO, sed unue telefonas tien por certiĝi pri ŝtelo. Samtempe telefonado iras al la domo de la Ĝenerala Direktoro de la CO. Nur tiu ĉi scias silentigi la alarmon, kiam ĝi bruas. Ofte la bruado fontas ne el detekto de ŝtelilo, sed pro apero de ajna homo, kiu ne povas elŝalti la alarmon, antaŭ ol voji al la koridoroj. Okazas ankaŭ, ke iuj estas en iu ĉambro nokte, sed alia, kiu kredas sin sola en la domo, enŝaltas. Nun la unuaj ŝatus iri hejmen, kaj jen ombro aperas al la dektetilo: la alarmo bruas.

Ankaŭ pro fumo alarmo bruas, ĉar estis en la CO detektilo de incendio. Kiam fumo akumuliĝas en la domo, la detektilo tute ne scias, ĉu oni kuiras aŭ fumas aŭ ĉu estas incendio. Ĝi tuj bruas. Jam okazis bruoj en la CO, sed tute ne temis pri ŝtelado nek incendio ; nur simpla neglektado de novaj oficistoj aŭ volontuloj.

Por eviti la krion de la alarmo, ĉiu novulo en la CO ricevas instrukciojn. Tamen oni bezonas iom da tempo por regi la tutan aferon. Manko de ioma regado ĉiam estas fatala. Volontuloj jam kriigis la alarmojn. Osmo kaj Pasquale prave trovis, ke Togolandanoj ne jam tiel pekis. Kiu Togolandano faris tion, tiu nur ŝatus friti ovojn, kaj la alarmo tute ne povis silenti. Ĉu tiel ĝi petos iom da ovaĵo ?

Alia afero, kiun mi mem spertis, estis fritado far volontulino. Tiam ni estis kvar novuloj en la CO. Matene, kiam mi estis en la banĉambro, mi aŭdis bruon. En la komenco ĝi estas ne tre laŭta. Iom post iom ĝi plilaŭtiĝis. Fine estis buntaj melodioj. Certe ne unu alarmo informis.

La sola virino inter ni tiam esti fritanta terpomojn. Fenestreto en la kuijero de la CO estu ĉiam malfermita, sed tiam tute ne. Jen do la detektilo trovis spuron de fumo, kaj tial avertis la tutan kvartalon. Kiam komenciĝis la bruo, Ĉino tiam volontulanta tie, klopodis silentigi ĝin. Li pensis, ke estas la alarmo kontraŭ ŝtelado. Tial li kuris al la ŝaltilo kun la intenco elŝalti. Li tute ne atentis, ke ĝi estas jam elŝaltita. Jen do li enŝaltis anstataŭ kontroli la elŝaltitecon. Ĉar homoj jam estas ene de la CO, ekster la ĉambroj, jen alia bruo aŭdiĝis.

Sporto estas bona por la homa sano, sed tute kontraŭvola sporto estas pli bone farita ol la memvola. Mi neniam vidis kuriston, kia estis Osmo tiam. Fulmrampide li venis de sia hejmo al la CO, kaj silentigis ĉion. Brave !

La listo ne la neglektantoj ne estu longa. Tial ĉi tranoktontoj en CO bonvolu informiĝi pri la sistemo. Ĝi estas tute simpla. Tial ne ĉiuj kriigas la alarmojn.

XI

La antaŭaj vortoj koncernas la Centran Oficejon inter 1999 kaj 2001. Kiam dum la UK zagreba en 2001 la tiama Ĝenerala Direktoro de UEA, Osmo Buller anoncis sian demision, kaj samtempe ankaŭ Pasquale Zapelli kaj Istvan Ertl, respektive Direktoro de la Centra Oficejo kaj redaktoro de la revuo Esperanto, estis antaŭvideblaj profundaj ŝanĝoj en la Centra Oficejo dum la postaj monatoj. Osmo diris, ke lia demisio komenciĝos en aprilo 2002, sed jam fine de decembro 2001 li ne plu laboros en la CO, ĉar li devas ĝui siajn feritagojn, kiujn li ne antaŭe prenis : entute 90 tagojn. Pasquale aldonis, ke li pretas tuj foriri se oni trovas anstataŭanton de li, se ne, li

restos plej malfrue ĝis la fino de la jaro 2001. Istvan deklaris, ke li restos ne ĝis la posta UK, kaj plej malfrue ĝis julio 2001. Tiam aŭdiĝis, ke aliaj oficistoj foriros : Roy iros al Japanio, Nikola trovos alian laboron, Francisko kaj Clay reiros al siaj respektivaj landoj. Krom Roy, kiu parolis pri sia plano japania ne jam certa, la aliaj mem diris nenion. Tial ĉi tiujn vortojn ni konsideru onidiroj. Dum la fermo de la UK zagreba la estraro de UEA dankis publike du oficistojn de UEA : Rob Moerbeek, kiu en la jaro pensiigis, kaj Simo Milojevic, kiu estis pensiigonta fine de la jaro. La estraro profitis la okazon por adiaŭi la tri homojn (Osmo, Pasquale kaj Istvan), publike dankante ankaŭ ilin. La dankoj estis ne nur el vortoj, sed ankaŭ el simbolaj donacoj.

Tiel ĝis la posta UK en Fortaleza, almenaŭ tri oficistoj de la CO ne plu laboros tie ĉi. Kaj la tempo ne haltis. Ĝi fluis kaj plufluas..

Tagoj pasis, monatoj sekvis. Kaj jen la jaro 2002. De julio ĝis decembro 2001 estis multaj tagoj, sed por la estraro ili tre rapide pasis. La estraro de UEA devis fronti la trovadon de homoj, kiuj anstataŭu la demisiantojn, kaj ankaŭ la pensiigonton. Kiam estas la volo, estas ankaŭ la povo. La oficeja komisiono tiucele starigita faris sian taskon.

Ĝi starigis sistemon, kiu ebligis al la CO plufunkcii. Nomumo de aganta Ĝenerala Direktoro kun la nomo Trevor Steele kaj trovo de nova redaktoro Stano Marček de la revuo *Esperanto* estis la unua konkreta paŝo. Trevor kaj Stano eklaboris en Januaro 2002, kiam okazis estrarkunveno de UEA.

Kiu estis tie tiam, tiu trovos nur ŝanĝeton en la CO : Trevor okupis la ĉambron de Osmo, dum tiu ĉi forestis de la CO. Li ne aperis en la CO dum la tuta estrarkunveno. Ĉiuj aliaj oficistoj estis tie. Tiam estis ankaŭ la nova redaktoro de *Esperanto*, kiu tiam volis konatiĝi kun la domo kaj la estraro de UEA. Kutime la redaktoro de la revuo *Esperanto* laboras en la CO, sed nun estas alia sistemo: la redaktoro laboras ekster la CO. Stano loĝas en Slovakio. Tamen ĝis nun en junio 2002, kiam estas verkata tiu ĉi artikolo, la revuo *Esperanto* aperas pli regule ol antaŭe. Tamen nun estas ŝanĝo rimarkinda en la CO.

Ĉe la unua paĝo de la dua folio de la revuo *Esperanto* de decembro 2001, la lasta de Istvan, estas foto : la tuta oficistaro (sen Simo) de UEA dum la periodo de la verkado de tiu ĉi libreto, kaj unu volontulo. En majo 2002, kiam okazis la printempa estrarkunveno de UEA, granda ŝanĝo vidiĝis en

la oficistaro : krom Osmo, ankaŭ Pasquale, Istvan, Ina Mercej kaj Francisko forestis. Aliaj vizaĝoj aldoniĝis : Ionel kaj Joost. Jes, estas ankaŭ nova purigistino. Tiuj novaj vizaĝoj donas novan etoson al la domo. Ni ne bezonas trakuri la tutan domon por tion vidi. Ni provu iri de la teretaĝo al la tria.

Sur la teretaĝo estas la libroservo. Tie nun estas barbulo. Ne, Simo ne jam pensiĝis, kaj li nun ne havas barbon. Lia barbiro ĉiam laboras, kaj tial ĉiam senbarba li estas. Nova libroservisto estas dungita: Ionel Ionet. La barbon havas ne Simo, sed li. Tamen se oni daŭrigas la promenadon ĉe la teretaĝo por atingi la salonon Zamenhof, oni povas vidi fumon en la ĝardeno. Tiam ni ne tuj diru, ke Simo estas tie. Necesas bone rigardi ĉu estas barbulo aŭ ne. Se barbulo, vi scias, kiu estas. Se ne, vi scias ankaŭ. Povas okazi, ke tie estas kaj barbulo kaj senbarbulo, tiam oni povas diri kiuj estas tie. Antaŭe, ofte estis nur unu persono tie en la ĝardeno, sed nun du. Tamen la folioj de la ĝardeno ĉiam verdaj estas.

De la koridoro oni povas vidi ĉion en la ĝardeno. En tiu koridoro mi unuafoje en majo vidis nigran virineton. Ne provu paroli al ŝi Esperanton : ŝi tute ne estas Afrikanino-Esperantisto, kvankam nun abundas Esperantistinoj en Afriko. Ŝi estas la nova purigistino, la afrikadevena virino tre bonhumora el Kabo Verda, kun la nomo Linda (ŝia vera nomo estas serio da hispanaj kaj portugaliaj eufoniaĵoj). Ŝi laboras nun ne frumatene kiel Ina, sed tagmeze. Tamen tio tute ne ĝenas la laboron de la oficistoj. Trevor trankvile retumas en sia ĉambro.

La laborejo de la Ĝenerala Direktoro troviĝas ĉe la unua etaĝo. Ĝi estas la ĉambro Minaja, kiun okupis siatempe Osmo. Ĉu tie estas granda ŝanĝo ? Certe jes. Ĉiu rajtas ordigi sian ĉambron kiel li volas. La komputilo de Trevor troviĝas sur lia labortablo. Ĉe tiu ĉi estas du seĝoj direktoraj. Ĉu Trevor havas novan, kiun li mem uzas, kaj lasas tiun de Osmo por vizitantoj ? Certe ne, ĉar mi longan horon sidis sur lia seĝo retumante. Jen alia humila homo. Tamen ni ne restu longe en tiu ĉi ĉambro. Supreniro necesas. Sed unue ni rigardu en la laboĉambron Monte-Carlo de Marvin. Ĉu tiu ĉi estas sola tie ? Se hazarde vi trovas virinon laboranta tie, tuj ne kredu, ke estas plia oficisto. Ina van der Krans-Verdouw estas volontulino, sperta pri financaj aferoj, kaj ekzemple dum jaroj prizorgas la rubrikon *Oficiala Informilo* en la revuo *Esperanto*.

Antaŭe ŝi ankaŭ unu tagon en la semajno helpas al Marvin. Nun ĉiuj rekonas, ke la laboroj ĉe la fako Marvinina fariĝas pli kaj pli granda, kian unusola homo ne faru. Jen Ina komprenas, ke ŝi pluhelpu : nun ŝi laboras du tagojn en la semajno. Nun ni mansvingu al Ina por migri supren.

Ĉe la dua etaĝo estas granda ŝanĝo. En la ĉambro Kanado neniam plu aperos Bart. La ĉambro Aŭstralio estas senhoma. Tie estas la granda malordego. Laboradis tie Francisko kaj Istvan. Tiu ĉi demisiis, do lin oni ne plu vidas tie. Sed Francisko devus resti tie ? Kie li nun estas ? Certe ie en la mondo. Se dum la unua trimestro de la jaro 2002 iu vidis Osmon en tiu ĉi ĉambro kune kun Francisko, tiu tute ne pensu, ke Osmo redungiĝis en la CO kaj anstataŭis Istvan. Osmo tiel morale subtenadis Franciskon, ke tiu ĉi finfaris laboron gravan. Post tiu ĉi laboro ambaŭ malaperis, kaj la ĉambro estas malplena. Estas nun tie tuta kaoso. Tion ĉi ni ne komparu al tio, kio estas nun en la ĉambro Stefano La Colla. Tie ĉi laboris Pasquale, kaj ĝin nun okupas Joost. En majo, kiam mi estis tie, vere estis malordo en la ĉambro. Tio estas tute komprenebla, ĉar Joost apenaŭ eklaboris, kaj li bezonas tempon por ordigi la aferojn laŭ sia gusto. Ĉu tia malordo regas ankaŭ supre ĉe la lasta etaĝo ?

Ĝis majo 2002 estas unu volontulo de TEJO en la CO. Tial la ĉambrojn Frank Netrval kaj Liech-Walter li okupis. La ĉambro Arabio kun la alnomo Adanifejo plue estas, kaj akceptas dormanton. Aliaj ejoj de tiu etaĝo, kie troviĝas litoj, estas Netrval kaj Sveda ĉambro. Frumatene, kiam iu sonoras ĉe la enirejo de la domo, ofte aperas Trevor. Certe li nun provizore dormas en Svedujo. Vere estas ege trankvila dormo, eĉ se la kafpaŭzoj malsupre en la ĉambro Edwin Burg ne plu estas kiel antaŭe. Mi ie legis : “klopodu ofte ripozigi la stomakon, ĉar ne ĉiam ĝi laboru”. Tial ĉi mi ne tute kafumas dum kafpaŭzoj. Tamen mi okulumas la kafumantojn.

Dum la kunsidoj januara kaj maja estis tute alia etoso. Antaŭe ĉiuj sidas en la manĝejo kaj trinkas, sed jam en aprilo 2001, kiam okazis la tiama estrarkunsido, oficistoj de CO prenis sian tason da teo/kafo kaj eliris el la manĝejo por resti en sia laborloko aŭ aliloke. Tio ripetigis ankaŭ en januaro kaj majo 2002. Tio tute ne koncernas Simon, kiu preskaŭ kutime trinkas

en la ĝardeno ; ĉiuj scias kial, ĉu ne ? Bone ! Nun ne nur li, sed ankaŭ Ionel. Tamen la interpersonaj rilatoj inter la oficistoj estas same bonaj kiel antaŭe. La laboroj iras glate, kion priskribis Trevor en la revuo Esperanto de majo 2002 en la artikolo „*Unu tago en la vivo de la Centra Oficejo*“. CO-umu tra liaj linioj !

XII

UNU TAGO EN LA VIVO DE LA CENTRA OFICEJO

Kion oni faras en la CO?

Antaŭ ol veni ĉi tien, mi mem foje demandis min pri tio, kaj ne mankis negativaj onidiroj : ke la laboro ‘stagnas’ ke la oficistoj ricevas altajn, ne vere meritatajn salajrojn, ke estus pli bone havi ĉenon da oficejetoj funkciigataj de senpagaj aktivuloj, ke la CO estas parto de ne-demokratia strukturo... Dum mi mem nove alveninta - la taskoj ankoraŭ ne iĝis rutinaj - sed ne plu tute nova, mi provos informi vin pri la funkciado de via Oficejo.

La titolo de la artikolo estas duonŝerco : la vivo de Ivan Denisoviĉ estas tia, ke unu tago similis ĉiujn aliajn. Ĉi tie la sola certeco estas, ke neniu tago similas alian. Almenaŭ la laboro de la Ĝenerala Direktoro estas tia, ke neniam oni povas diri al si : hodiaŭ mi faros tion kaj tion kaj tion ĉi. Senescepte la kulturoj de la tago ŝanĝiĝas pro vizitoj, pro ne atenditaj telefon-aŭ retmesaĝoj, pro urĝaj petoj de ie en la mondo aŭ pro alispecaj bezonoj mi provu doni ideon pri la tutteama laboro hodiaŭ, frue en la aprilo 2002.

Sur la teretaĝo laboras Simo, nia libroservisto. Kiom da mendoj ni plenumos hodiaŭ, mi ne scias (kaj la poŝto ankoraŭ ne venas), sed probable estos almenaŭ deko da ili. Ĉiu 'plenumo' estas al si mem serio da taskoj : foje necesas kontroli, ĉu la mendinto havas sufiĉe da mono en sia konto, kaj se ne ĉu tamen sendi (UEA ne estas profitcela entrepreno, sed ĝi havas sian limigitan buĝeton !). Sekvas pakado (foje temas pri granda stoko da libroj), afrankado, ekspedado, fakturado kaj registrado de ĉiu vendo ĉar iam necesos remendi, se nia stoko (preskaŭ) elĉerpiĝos. Sed ne per tio finiĝas la laboro de libroservisto. Ni peras la abonon de multaj ne-UEA-periodaĵoj, kaj estas li, kiu registras kaj komentas la rubrikon *laste aperis* en la revuo. La plej postula tasko de Simo estas la libroservo ĉe UK. Necesas decidi kiajn kaj kiom da libroj kunporti kaj aranĝi transporton, kaj la pakado, ekspedado kaj malpakado vere estas fizike peza laboro (kompare kun tio, la laboro pri la Malfermaj Tagoj estas relative facila). Kaj Simo, kun siaj multaj jaroj da laboro en la oficejo, estas valora informfonto por la nova, nesperta Direktoro.

Pardonu, mi devis interrompi la skribadon de tiu ĉi artikolo por respondi al diversaj telefonvokoj (temis pri la nova komunikadcentro en Bruselo pri subvencio de TEJO, pri monhelpo al afrika viktimo de vulkaneruptio, kaj pri dungo de nova purigistino). Mi ne listigis ĉiujn laborojn de Simo, sed ni iru pluen laŭ la teretaĝo al Clay, kiu hodiaŭ ĉefe pritraktas aliĝojn kaj mendojn rilate al la UK en Fortalezo. Li devas fari tion tre zorge, kaj li komparas ĉiun adreson alvenintan kun la registroj en nia adresaro (ne ĉiam homoj skribas sian nomon klare). Se Clay ne laboras pri kongresaferoj, li helpas Marvin, nian kasiston, kies taskaro estas vere senlima, aŭ li (Clay) okupiĝas pri etiketado aŭ portas niajn sendaĵojn al la poŝtoŝtampo. Foje mi sendas Clay aĉeti ion en la urbo, kaj tion li faras kun la kutima rapideco kaj efikeco.

Fine de la sama koridoro estas la nuna regno de nia 'Makintoŝulo' Roy. Lia tago komenciĝas per forfiltrado de la multaj 'spamaĵoj' el nia retmesaĝaro kaj sendado de la utilaj mesaĝoj al la koncernatoj. Tiujn li ankaŭ endosierigas kaj printas laŭ neceso. Ĉar Roy laboras nur per mankintoŝaj aparatoj, oni ĉiam vokas lin, se estas problemoj pri alia makintoŝkomputilo, kaj tiaj laŭokazaj taskoj povas postuli multe da tempo. Lia ĉefa laboro estas tamen enpaĝigo de ĉiuj produktoj de UEA, ĉu temas pri libroj, dokumentoj aŭ

informfolioj. Roy ankaŭ heredis la redaktadon de la rubriko *Navige* en la Revuo. Li petas legantojn, kiuj scias pri nove aperintaj aŭ ĝisdatigitaj esperantaĵo en la reto, kontakti lin ĉe <navige@co.uea.org>. Alia tasko de Roy estas prizorgi la tradukadon de *Gisdate pri Esperanto* en naciajn lingvojn. Se la telefono tintas (kaj kiam ĝi ne tintas !?), kutime estas nia sekretariino Atie, kiu respondas. Estas Atie kiu plej ofte akceptas vizitantojn. Sed ŝia laboro temas pri multo alia : estas Atie kiu daŭre aktualigas nian adresaron, registrante ankaŭ membrokategoriojn kaj kiam vi sendas malnovstilan limakpoŝtaĵon al ni, Atie unue ĝin malfermas pludirektas al la koncerna oficisto. Aldone, Atie sendas amason da leteroj, 'postsendas' mankantajn revuojn, kaj foje tradukas nederlanden niajn oficialajn leterojn. Ĵus mi rememoris ke estas tempo sendi revarb-leteron al kelkaj centoj da pasintjaraj membroj : mi tajpos kaj poste Atie transprenos la adresaron kaj ekspedon. En la sama ĉambro kiel Atie estas Cindrulino, kiu volontulas dum kelka tempo. Jam ŝi liberigis Atie de la kuirejaj taskoj, helpas Marvin, nian tro ŝarĝatan kasiston, kaj krome plenumas la gravan taskon kanali inter la Centra Oficejo kaj nia diligenta redaktisto Stano. Ŝi sendas al mi nekrologojn kaj ĝeneralajn informojn, serĉas recenzantaĵojn de libroj, laŭnecese kontaktas malfruantajn 'recenzantojn', sendas aŭtorajn ekzemplerojn de la Revuo. Krome ŝi zorgas, ke estu ekzemple sufiĉe da papero, dosierujoj, ktp. en diversaj ĉambroj.

Sur la sama etaĝo estas la ĉambro de Marvin, ĝangalo de nigraj dosierujoj, kaj li senhezite scias kie trovi kion. Marvin administras nian monon, kaj kutime iras hejmen eĉ pli malfrue vespere ol la kolegoj. Eksterulo apenaŭ komprenus lian taskaron, kaj malgraŭ helpo de Ina, kiu venas unu tagon semajne, Clay kaj de Cindrulino, li estas daŭre sur peza ŝarĝo. Kiel Direktoro ni devas havi klarajn ideojn almenaŭ pri la konturoj de nia financoj, kaj Marvin ĉiam pacience klarigas al ni, kiam mi iras serĉi informojn, sed sendube estas momentoj kiam li preferus, ke mi iru al la diablo kaj lasu lin ataki la monton da paperoj sur lia tablo.

Ni surpréniru en la ĉambro de la plej nova oficisto Joost. Ni dungis lin unuavice por konverti nian komputilsistemon. Iam ni multe profitis de lia laboro : ekzemple, ni estas ĉiuj daŭre ligitaj al la reto, kaj iom post iom la kelkdekjara datenaro estas konvertata en pli facile uzeblan formon. Joost transprenas iom post iom aliajn taskojn : li aĉetas niajn oficejajn

ilojn, li kontrolas la fakturojn de telefono, fakso, ktp., kaj nun li ekredaktas kun mi la Jarlibron, unu el la bazaj tekstoj de nia ekzisto kiel esperantistoj. En la apuda ĉambro, laboras Francisko, kiu fakte baldaŭ forlasos nin. Sed li ĵetas sin en sian lastan taskon, ilustradon de la libro de Boris Kolker, *Vojaĝo en E-lando*. Francisko estas artisto siakampa kaj lia temperamento postulas, ke lia laboro estu altkvalita. En antaŭaj jaroj li redaktis *Kontakton*, ilustris tiun ĉi revuon kaj multajn librojn eldonitajn de UEA, kaj faris tutan galeriojn da fotoj kiuj longe utilos al ni.

Kelkajn fojojn semajne venas Rob Moerbeek, la aglo-okula. Rob estas profesinivela provlegisto, fervora amanto de niaj lingvo kaj literaturo, ĝismorta malamiko de preseraroj. Krome li enarĥivigas niajn revuojn, leterojn, bildojn, fotojn, ktp., kio povus okupi lin plentempe. Se mi volas trovi obskuran revueton el la 1950-aj, mi turnas min al Rob ; se ni volas scii la ekzatajn vortojn de iu citaĵo, li trovos ilin por mi.

Preskaŭ lastaloke mi mencias Nikola nur pro tio, ke ni ĵus atingis lian angulon de la oficejo. Dum multaj jaroj Nikola estas la ĉefa respondeculo pri kongresoj, alia centra parto de nia E-ista vivo. Lia laboro devigas multe da vojaĝado (ne ĉiam plezuro !), multe da kontaktoj kun urboj, iuj volas okazigi UK, kun LKK-oj, kun kongresejoj, kun flugkompanioj, kun hoteloj ; ankaŭ li pasigas multe da horoj cerbumante pri buĝetoj kaj pri mil ŝajne malpli gravaj detaloj de kongresa organizado. Ju pli sukcese Nikola laboras, des malpli mi scias pri tiu laboro !

Tute supre laboras Kriĉjo, nia TEJO-oficisto. Li baze servas kiel ligo inter la TEJO-estraro kaj la CO. Inter liaj ĉefaj taskoj estas fari subvencipetojn por nia junulara movado kaj li prizorgas la adresaron, arĥivojn kaj eksterajn rilatojn de TEJO. Kiam li ne okupiĝas pri TEJO-aferoj, li estas 'poŝtisto' de la CO.

Mi bezonis du tagojn por verki tiujn ĉi liniojn. Kvankam mi esperis fari la artikolon en unu-du horoj, venis daŭre urgaj taskoj. Kaj mi servas kiel peranto inter nia same diligenta estraro kaj la oficistoj, nia plej grava tasko. Malgraŭ mia okupiteco mi ne perdis la senton, ke estas privilegio labori en la centro de nia unika organizo. Ĉiutage ni havas kontakton kun ĉiuj kontinentoj. Ni estas ja pioniroj, nenie ni vivas grandnombre, sed ni jam rajtas diri ke ni estas la portantoj de internaciaj lingvoj kaj ideoj.

Antaŭ nelonge mi intervjuiĝis en la laborministerio. La oficistoj tie havas

taskon : protekti la laborkondiĉojn de landaj kaj eŭropuniaj homoj. Sendube ili faras sian taskon diligente kaj efike, sed mi konstatis, ke en ilia mondo plej gravas pasportoj kaj ŝtatanecoj.

Ni, esperantistoj apenaŭ konscias pri ies ŝtataneco, niaj juĝkategorioj estas tute aliaj. Nia bela naiveco pri tiuj paperaj diferencoj fariĝu tutmonda. La semoj de nia arbo kresku ! Tiu planto estas ankoraŭ eta kaj protektenda, kaj ni ĉiuj celas ĝin kreskigi.

Trevor Steele.

Afrika Oficejo
Lome, aŭgusto 2002.